

El Popola Ĉinio

人民中國報道



PEKINO 3 1 9 6 0

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO

VERDA TOTO
JARZYSA
KLD
WYDZIAŁ KRAJOWY
KRAJOWY ZWIĄZOK ESPERANTYSTÓW
WARSZAWA




Dank' al persista edukado postlabora dum la pasintaj 10 jaroj, la plejparto de la gelaboristoj de l' Stata Ŝijan-paperfabriko en Gilin-provinco, jam altigis sian kulturenivelon ĝis mezlernejaneco. Jen unu el ĝiaj mezgradaj kursoj en ekzameno.

Prenante laborejojn kie lernocambrojn, la Pekin Valvo-fabriko bone kombinas la postlaboran edukadon kun produktado.

EDUKADO EN POSTLABORAJ HOROJ

Sube maldekstre: La Unua Aŭtofabriko de Ĉang-ĉun fondis ne nur elementajn kaj mezgradajn kursojn, sed ankaŭ 22 postlaborajn kolegiojn kaj 6 teknikajn institutojn, en kiuj lernas pli ol 15,000 gelaboristoj. La lernantoj bone kombinas sian lernadon pri tekniko kaj teorio kun sia praktika laboro.

Sube dekstre: K-do Juan Ŝou-ŝuj, metilerninto, nun estas laborejestro kaj bona studento kvarajara de farmacio dank' al sia diligenta postlabora lernado.



Pri la Nacia Ekonomia Plano por 1960

VERDA VOJO
ESPERANCI KLUBO TOWARZYSK
SOCIETY ESPERANTO - KLUB
GDANSK-DIREKCYJNA 2/4

EN la 30-a de marto, 1960, malfermiĝis la Dua Sesio de la Dua Nacia Popola Kongreso de nia lando, al kiu faris raporton pri la Projekto de la Nacia Ekonomia Plano por 1960, K-do Li Fuĉun, vic-ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro kaj prezidanto de la Ŝtata Plan-Komisiono, en la nomo de la Ŝtata Konsilantaro.

En sia raporto Li Fuĉun detale resumis la gigantajn atingojn en disvolvado de la nacia ekonomio de nia lando kaj la ĉefajn spertojn akiritajn ekde la granda antaŭensalto, eksplikis la politikojn kaj taskojn por disvolvi la nacian ekonomion en 1960, kaj alvokis la tutan popolon de la lando ankoraŭ pli antaŭen puŝi la kampanjon de teknika renovigo kaj teknika revolucio, kaj lukti por plenumi kaj superplenumi la ĉijaran planon de disvolvo de la nacia ekonomio.

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 3 (60) 1960

Bildo sur la kovrilo — **Konkuro en Poeziverkado kaj Pentrado** (Novjara bildo de Fan Fenjan)

Pri la ekonomia plano por 1960

Kreskas la ĉina laborista intelektularo

Paŝosignoj de progresado

Entrudiĝinte la pordon de natura scienco

Mia dekjara lernado

Kantantoj pri socialismo

Printempo jam venas . . .

Ŝanhajo sub ŝtormo de renovigo kaj revolucio teknikaj

Tibeta popolo impetas al demokratio kaj socialismo


Eterna amikeco

Esperanto marŝas

Bildo sur la dorsa kovrilo — **Lulkanto**
(Ĉinstila pentraĵo de Li Ĉuan)

Li diris ke en 1959 la popoloj de diversaj nacioj de nia lando, sub la gvido de l' Ĉina Komunista Partio kaj K-do Maŭ Zedong, daŭrigis la efektivigon de granda antaŭensalto de nacia ekonomio sur la bazo de tiu en 1958. La cititaj ciferoj de la raporto montris ke nia totala produktvaloro de industrio kaj agrikulturo kreskis je 31.1% kompare kun tiu de 1958, la jaro de granda antaŭensalto. El tio la kresko de industria produktvaloro estis 39.3% kaj tiu de agrikulturo 16.7%, kompare kun 1958. La totala investo de fundamenta konstruado en la ŝtata budĝeto kreskis je 24.5% kompare kun 1958. Ĉiuj branĉoj de ekonomio daŭris disvolviĝi je la antaŭensaltega rapideco en 1959. Ankaŭ scienco, edukado, kulturo, korpokulturado kaj publika higieno akiris grandan disvolvon. Rezulte de la antaŭensaltegoj en la du jaroj estis plenumitaj la ĉefaj celoj de la 2-a KJP je 3 jaroj pli frue. Li diris ke tio estis grandioza venko de nia popolo kaj de la penso de Maŭ Zedong, kiu kunligas la universalan veron de marksismo-leninismo kun la konkreta praktikado de la revolucio kaj konstruado de Ĉinio.

Li Fuĉun emfazis ke la daŭra antaŭensaltado en la du jaroj pruvis ke la Ĝenerala Linio — streĉi plene la energion kaj strebi ĉiam supren por multe, rapide, bone kaj ŝpare konstrui socialismon — estas grandioza kreo kaj havas ekstreme riĉan enhavon. Ĝia elirpunkto estas: la popolamasoj estas kreantoj de historio kaj estas la plej aktiva faktoro de la produktforto. Li diris ke *por senĉese disvolvi la iniciatemon de la popolamasoj, sekvante la marksisman-leninisman principon de kombino de la teorio de seninterrompa revolucio kun tiu de revolucio laŭ stadioj, eksplikitan de K-do Maŭ Zedong, senĉese solvis racie la kontraŭdirojn inter produktaj interrilatoj kaj produktaj fortoj kaj inter superkonstruaĵo kaj ekonomia bazo. La senĉesa reformado de superkonstruaĵo laŭ la postuloj de rapida disvolviĝo de produktaj fortoj, malfermas vastan vojon al daŭra disvolvado de produktaj fortoj.* Li diris ke tuj post la decida venko de la socialisma revolucio en posed-sistemo de produktaj rimedoj en 1956, estis entreprenata la socialisma revolucio sur la frontoj politika kaj ideologia en 1957. En 1958 kaj 1959 en la entreprenoj posedataj de la tuta popolo kaj ŝtataj institucioj estis farata vico da reformoj en administracia strukturo, regularo kaj labor-sistemo, laboraj interrilatoj kaj metodoj de gvidado. Precipe en socialisma konstruado estis efektivigata kompleta serio da politikoj de "marŝado per du kruroj". En ĉiuj



ekonomiaj laboroj, ni kontinue plifortigis la gvidadon de la Partio, metis politikon en komandon kaj disvolvis grandskale amasmovadojn. Ĉio ĉi tio komplete kaj plene mobilizis la iniciatemon de la popolamasoj, kaj tiel rezultis la kontinua antaŭensaltado en nia socialisma konstruado.

Parolante pri la riĉaj spertoj, li aparte rimarkigis la grandan signifon de la disvolviĝo de la popola komunumo. Li diris ke dank' al la leviĝo de la politika konscio de la popolamasoj kaj apero de la situacio de la granda antaŭensalto, efektiviĝis la popolkomunumigo en la vasta kamparo de nia lando. La popola komunumo, organizo pli grandskala, kun pli alta grado de publika posedo, kombinanta la industrion, agrikulturon, komercon, edukadon kaj militajn aferojn kaj unuiganta la registaran administradon kun la komunuma mastrumado, estas la plej bona formo de bazaj sociorganizoj por rapidigi nian socialisman konstruadon kaj, estonte, por transiro de socialisma socio al la komunisma. Ĝi, unu paŝon plie, mobilizis kaj organizis la fortojn de la pli ol 500-miliona kamparanaro. Nun la urboj tra la tuta lando estas grandskale starigantaj popolajn komunumojn, stratan industrion*, antaŭurban agrikulturon, komunajn bonutilajn servojn kaj komunajn manĝejoj, vaste organizantaj ekonomian vivon de urbanoj, plue organizantaj la urbajn loĝantojn kaj liberigantaj milojn kaj dekmilojn da dommastrinoj el dommastrumaj laboroj por partopreni la sociajn. Ĉio ĉi ne nur estas utila al disvolviĝo de produktado kaj konstruado, sed ankaŭ al ĝisfunda reformo de la socia vivo de la urboj.

Li Fuĉun diris ke ni akiris riĉajn spertojn en la grandioza praktikado dum la antaŭensaltado en 1958 kaj 1959, kiuj montris al ni: Estas tute ebla la disvolvo

de nacia ekonomio kun rapideco de granda antaŭensalto en socialisma sistemo. Ĝi estas io kun objektiva nepreco. La Ĝenerala Linio, granda antaŭensalto kaj popola komunumo estas tri mirindaj ĉefŝlosiloj por la tuta periodo de nia socialisma konstruado; ili estas produktaj de Maŭ Zedong-a penso. La standardo de Maŭ Zedong-a penso estas standardo de venko. Serioza ellerno kaj posedo de Maŭ Ze-dong-a penso estas fundamenta garantio, por ke ni rikoltu estonte ankoraŭ pli grandajn venkojn.

Li Fuĉun asertis ke 1960 estas tre grava jaro por nia afero de disvolvo de socialisma konstruado. La daŭra antaŭensaltego de la nacia ekonomio, al kiu la tutlanda popolo strebas, starigos bazon por kontinua antaŭensaltado en la periodo de la 2-a KJP kaj de la tuta periodo de sesdekaj jaroj. Li diris ke ni devas pli bone plene efektiviĝi la Ĝeneralan Linion de socialisma konstruado de la Partio, kaj strebi al ĉiuflanka kaj pli bona antaŭensalto de la nacia ekonomio, surbaze de daŭra antaŭensaltado de la pasintaj du jaroj. Por plenumi tiun taskon en aranĝado de la plano de nacia ekonomio por 1960, oni devas pli firme certigi la agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel superregan faktoron, kunigante antaŭecon por disvolvo de peza industrio kun rapida disvolvo de agrikulturo; daŭrigi la politikon de ĉion-ampleksa aranĝado kun ŝtalo kiel akso en industrio kaj greno kiel akso en agrikulturo, kaj plue plifortigi transporton kaj industriojn de movenergio, mineral-elfosado k. a., por pli konvene trakti la

* Strata industrio: industrio irigata de urbaj loĝantoj kaj ilin absorbanta, dank' al kiu multaj laborfortoj antaŭe ne produktaj estas organizitaj en produktado.

rilatojn inter peza, malpeza industrioj kaj agrikulturo, kaj tiujn inter la diversaj branĉoj de ili interne, kaj efektiviĝi pli bone la antaŭensalton de nacia ekonomio.

Li Fuĉun diris ke agrikulturo ludas tre gravan rolon en disvolvo de nacia ekonomio, kies bazo ĝi estas. Rapidigi la disvolvon de agrikulturo, serioze kaj plene efektiviĝi la 40 artikolojn de la Programo de Agrikultura Disvolviĝo estas centra ĉenero en alt-rapida kaj laŭproportia disvolvado de nia socialisma plana ekonomio. En agrikultura produktado en 1960 oni devas daŭre preni grenon kiel akson, kaj garantiante kreskon de grenprodukto, oni devas aranĝi ĉionampleksante la produktadon de greno, kotono, oleplantaĵoj, kanabo, silko, teo, sukero, legomoj, tabako, fruktoj, medicinaj plantaĵoj kaj diversajoj-plantaĵoj, kaj praktiki samtempan entreprenon de agrikulturo, forstado, bestbredado, flankaj okupoj kaj fiŝado, por ĉiufanka, granda disvolvo de agrikulturo. Bestbredado devas samrangigi kun plantado, kaj porko devas okupi ĉefan lokon en bestbrede. Tio estas grava paŝo por akceli la ĉiufankan disvolvon de agrikulturo.


Per plirapidigi la disvolviĝon de agrikulturo, en 1960, samtempe kun plua disvolvo de la avantaĝoj de la popola komunumo, oni devas antaŭenpuŝi la teknikan reformon de agrikulturo por levi ĝian laborproduktivon. Li montris ke dum la pasintaj dek jaroj la alianco inter laboristaro kaj kamparanaro de nia lando trapasis du stadiojn, t. e. tiu de agrara reformo kaj tiu de kooperativigo. Sub la kondiĉoj ke jam efektiviĝis la popolkomunumigo en la kamparo, ni devas antaŭenŝovi la aliancon al nova etapo, ke la industrio aktive subtenu la agrikulturon, kaj la agrikulturo bazu sin, paŝon post paŝo, sur fundamento de modernigo. En mekanikigo de agrikulturo, la celo de nia strebado estas: malgranda solvo en 4 jaroj, meza solvo en 7 jaroj kaj granda solvo en 10 jaroj, kalkulate ekde 1959, kaj klopodo efektiviĝi fundamente la mekanikigon kaj irigaciatigon de agrikulturo en landa skalo kaj certgradan elektrigon en tempo de ĉirkaŭ 10 jaroj. Por akceli rapidan disvolviĝon de agrikulturo, la departementoj de industrio, transporto, komerco, financo, scienco, edukado, kulturo, higieno, k. a. devas ĉiuj preni sur sin kiel sian gravan taskon subteni agrikulturon. Inter ili peza industrio ludas speciale gravan rolon. En 1960 la ŝtato asignis 1,100,000 tunojn de ŝtalo por fabrikado de agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj, kun kresko de ĉirkaŭ unuoblo. Kaj en 1960 sur la tereno de agrikulturo estos nove provizata mekanika movforto de pli ol kvin milionoj da ĉevalpovoj. La areo de mekanike plugataj agroj atingos pli ol 100 milionojn da muoj, de la mekanike irigaciataj pli ol 200 milionojn da muoj.

Li Fuĉun diris ke en 1960 daŭros grandskala fundamenta konstruado. Krom daŭra atento pri la

necesaĵ grandtipaj konstruprojektoj, ĉiuj fakoj de industrio, transportkomunikado, ĉiuj lokoj kaj popolaj komunumoj devas kun aktiveco plue establi aron da novaj entreprenoj "malgandaj, modernaj kaj multnombraj" kaj "malgrandaj, indiĝenaj kaj multnombraj", kaj samtempe levi la nivelon de tiuj ambaŭ jam starigitaj. Ĉie, kie troviĝas karbo kaj fero, devas stariĝi novaj entreprenoj de karboelfosado, koakso-ekstraktado, fergisado kaj ŝtalproduktado, "malgrandaj, modernaj kaj multnombraj" aŭ "malgrandaj, indiĝenaj kaj multnombraj", por antaŭirigi tiajn entreprenojn de aliaj branĉoj. Kaj konforme al la bezonoj de disvolvado de produktado kaj konstruado, laŭ lokaj kapabloj oni devas konstrui malgrandajn modernajn fervojojn aŭ malgrandajn, indiĝenajn fervojojn en necesa kvanto.

Investo por Kapitala Konstruado

La investo por kapitala konstruado en 1960 sumas 32,500,000,000 juanojn ekskluzive la Ĉ. 6,000,000,000 juanojn investotajn de lokaj instancoj kaj entreprenoj.




La vic-ĉefministro plue klarigis pri aranĝado de la planitaj celoj por 1960, koncerne al jenaj naŭ flankoj: peza industrio, subteno de peza industrio al agrikulturo, agrikulturo, malpeza industrio, industrio de kamparaj kaj urbaj popolaj komunumoj kaj urbaj stratoj, transport-komunikado, komerco, laboro kaj salajro, kaj fine scienca esploro, kulturo, edukado kaj publika higieno. *La totala produktvaloro de industrio kaj agrikulturo en 1960 atingos 298 miliardojn da juanoj, kun kresko de 23% kompare kun 1959. En ĝi tiu de industrio estos 210 miliardoj da juanoj kun kresko de 29%, kaj tiu de agrikulturo 88 miliardoj da juanoj kun kresko de 12%. La investo de fundamenta konstruado estos 32.5 miliardoj da juanoj (ekskluzive de la 6 miliardojn da juanoj investitajn de la lokaj instancoj kaj de la entreprenoj mem), kun kresko de 21.7%. Grandan kreskon havos ankaŭ la ĉefaj produktaĵoj industriaj kaj agrikulturaj, entenitaj en la ĉijara plano. La produkto de ŝtalo (ekskluzive de ŝtalo indiĝena) estos 18,400,000 tunoj, kun kresko de 38%; karbo 425 milionoj da tunoj, kun kresko de 22%; tiuj de greno kaj kotono kreskos po ĉirkaŭ 10%. La produkto de kotonŝpinajo estos 9 milionoj da pakajoj (po 181.44 kg.), kun kresko de 9%; kotona ŝtofo 7.6 miliardoj da metroj, kun kresko de 1.3%; sukero 1,300,000 tunoj kun kresko de 15%. La produktvaloro de la industrio de la kamparaj popolaj komunumoj kreskos je 50% kompare kun 1959; tiu de la industrio de la urbaj popolaj komunumoj kaj de strata industrio kreskos je ĉirkaŭ unu oblo. La volumeno de frajto per modernaj transportiloj kreskos je 42% kompare kun 1959. La totala podetala vendado de varoj en 1960 kreskos je 14%. La laborproduktiveco en industrioj leviĝos je ĉirkaŭ 25%. La meznombra salajro de la laboristoj kaj oficistoj leviĝos je 6%.*

Post menciado pri la disvolva plano de scienca esploro, kulturo, edukado kaj publika higieno por 1960, Li Fuĉun diris, ke ĉiuj provincoj, urboj, aŭtonomaj regionoj, specialaj administraciaj regionoj kaj gubernioj aktive establos, sub la direkto de la ŝtata plano, mezajn kaj altajn lernejojn, kiuj estos destinitaj por priservi la produktadon kaj konstruadon de sia loko. En scienca esplorado la fortoj de ĉiuj flankoj estos mobilizataj por lerni, studi kaj posedi la plej novajn atingaĵojn de la scienco kaj tekniko en la mondo, resumi la riĉajn spertojn de la praktikado de la amaso, kaj lukti por efektiviĝi en kompare mallonga tempo la 12-jaran Planon de Disvolvado de Scienco kaj Tekniko. En kulturaj entreprenoj estos aplikataj la principoj de "planado super ĉio, disvolvado kun energio, koncentrigo sur ĉefaj konstruprojektoj kaj plibonigo de kvalito" por certigi ke tiuj entreprenoj estu pli bone kunordigitaj kun kaj donantaj antaŭenpuŝon al la granda antaŭensalto, servu al la revolucioj teknika kaj kultura, kaj levu altan tajdon de konstruado de socialisma kulturo. En publika higieno oni devas

daŭre disvolvi energie la amasan higienan kampanjon por ekstermo de la kvar malutilaj bestoj, observigo de higienaj reguloj, kaj eliminado de ĉefaj malsanoj. Kaj oni devas energie daŭrigi la amasan movadon por korpa kulturado, tiel en urboj kiel en vilaĝoj.

Li Fuĉun montris ke la naciekonomia plano por 1960 estas plano de daŭra antaŭensalto kaj estas plano realigebla kaj superplenumebla por ni post klopodado. Venke realiginte tiun planon, ni jam havos eblon lukti por kuratingi aŭ antaŭkuri Brition en produkta kvanto de ĉefaj industriaj produktaĵoj en malpli ol 10 jaroj kaj realigi antaŭtempe la Programon de Tutlanda Agrikultura Disvolvado por la Periodo 1956-1967.

† *Malgrandaj, modernaj (indiĝenaj) fervojoj: fervojoj kun malvasta kaj malpeza trako kaj respektive malpli grandaj lokomotivoj, vagonoj kaj aliaj instalaĵoj. Tiuj indiĝenaj havas eĉ relojn ferajn sed ne ŝtalajn kaj tirmaŝinon alian ol lokomotivo.*



En la lasta parto de sia raporto de vic-ĉefministro detale parolis pri la movado nun disvolvata inter nia popolo de teknika renovigo kaj teknika revolucio, kun mekanikigo kaj duonmekanikigo, aŭtomatigo kaj duonaŭtomatigo kiel enhavo. Li diris ke la grandioza militiro de nia popolo por subigi la teknikan postrestecon jam komenciĝis en amplekso de la tua lando. La movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio karakterizata per partopreno de vasta amaso estas konsekvenca rezulto de la senĉese farataj revolucioj ekonomia, politika, ideologia kaj kultura, kaj nepra produktaĵo de la Ĝenerala Linio, granda antaŭensalto kaj popola komunumo. Ĝi nepre plirapidigos la proceson de modernigo de niaj industrio, agrikulturo kaj scienco-kulturo, plue

plialtigos la rapidecon de nia socialisma konstruado, kaj plu levos la komunisman konscion kaj la nivelon de scienco, tekniko kaj kulturo, de la popolamasoj.

Li Fuĉun diris ke ni jam akiris la rapidecon de antaŭensaltego en konstruado de socialismo, kaj la samon ni albatalu ankaŭ en teknika reformado. Li alvokis la popolon de la tuta lando pli vaste kaj pli profunde disvolvi la kampanjon de teknika renovigo kaj teknika revolucio, por ke ĝi senĉese fortikiĝu, disvolviĝu kaj leviĝu, kaj antaŭeniru sur ĝusta kaj scienca vojo en naciampleksa skalo.

‡ *Kvar malutilaj bestoj: rato, cimo, muŝo kaj moskito.*

Lie Ven:

Kreskas la ĉina laborista intelektularo

La granda antaŭensalto de la patruja konstruado postulas armeon da teknikistoj

Kun la altrapida disvolviĝo de la socialisma konstruado, la kontinua antaŭensaltego en la industria produktado kaj konstruado, la senĉesaj reformado kaj renovigo de la tekniko kaj ekipaĵo, Ĉinio postulas ĉiam pli multe da teknikaj laborantoj. Laŭ taksado, ĉirkaŭ 200,000 laborantoj el alt- kaj mezgradaj lernejoj pri industria faka tekniko estas bezonataj en 1960. La diplomitoj el alt- kaj mezgradaj tuttagaj faklernejoj nombras 130,000 personojn. Multe pli granda estas la nombro kompare kun tiu en la pasinteco, sed ankoraŭ ne povas plenumi la bezonon de la altrapida konstruado. Tial, por rapide formi grandan armeon de sciencistoj kaj teknikistoj, estas necese, krom la tuttagaj lernejoj fondi universitatojn en la grandaj fabrikoj kaj minejoj, kulturi el laboristoj sciencajn kaj teknikajn laborantojn. En Hejlonggiang-provinco, 79 fabrikoj kaj minejoj ĉiu kun pli ol 3,000 laboristoj ĝenerale enkondukis kompletan sistemon de edukado. Komence de elementaj lernejoj, mezlernejoj ĝis uni-

versitatoj. El la 1,800,000 junuloj kaj plenaĝuloj kiuj laboras en la entreprenoj de la tuta provinco, pli ol 1,540,000 jam partoprenis postlaboran lernadon. Laboristoj lernantaj en elementaj lernejoj nombras pli ol 940,000 personojn, en mezlernejoj pli ol 460,000, kaj en altaj lernejoj pli ol 16,600. Nun la nombro de lernantoj en postlaboraj universitatoj de la tuta

**Por helpi la postlaboran edukadon, la Pekina Konstru-
industria Kolegio disponigas al la gestudentoj de Pekina
Postlabora Kolegio Dinamika sian laboratorion.**

Foto de Gu Dehua





**Gestudentoj de la Vespera Universitato en la maŝinfabriko
Gianvej, Harbino, en lernado.** *Foto de Tong Dejin*

lando atingis jam pli ol 160,000. En la tempo de la granda antaŭensalto, la vasta amaso de laboristoj kun plena agemo kaj decida volo, kuraĝas grimpi sur la pinton de la kulturo kaj scienco, por ludi pli grandan rolon en la socialisma konstruado.

Universitatoj establiĝas en industriaj kaj minekspluataj entreprenoj

Ekde la antaŭensalto en 1958, multaj grandaj fabrikoj kaj minejoj plue fortigis la gvidadon de postlabora edukado por laboristoj, kaj krom akcelo de analfabeteca likvidado, disvastigo de elementa edukado, kaj disvolvo kaj firmigo de mezgrada edukado, oni ankaŭ turnis sian atenton al starigo de altaj lernejoj. Ekzemple, la postlabora teknika kolegio de Harbina Ŝtata Vej Gian Maŝinfabriko enlasis pli ol 700 lernantojn en 1959, kaj fondis en fabrika hospitalo postlaboran medicinan instituton, kiu enskribis 40 novajn lernantojn. Nun la fabrika universitato pligrandigis de du klasoj kun 80 lernantoj en 1956, la jaro de fondiĝo, ĝis 16 klasoj kun 850 lernantoj, el kiuj pli ol 20% estas laboristaj studentoj. La nombro de profesiaj instruistoj kreskis de 2 ĝis 23. Pro senĉesa altiĝo de la klereca kaj teknika niveloj ĉe la laboristoj, la movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio de la fabriko sin puŝas en novan altan tajdon. Dum la movado, 170 studentoj de la postlabora universitato faris inventojn kaj iniciatojn, el kiuj pli ol 150 estis de pli ol 60 laboristaj studentoj. Tri el la kvar sistemoj de aŭtomata

produkta linio de la fabriko estas projektitaj kaj fabrikitaj ĉefe de la laboristaj studentoj. Laŭ la nombro de studentoj nun lernantaj en la postlabora universitato, oni povas anticipi ke 500 altgradaj teknikistoj povos esti kulturitaj en tri aŭ kvar jaroj. Sed, tiu ĉi nombro estos ankoraŭ tro malgranda por la efektiva bezono. Tial, la fabriko planas en 1960 pliiigi la nombron de lernantoj ĝis 1.200, kaj klopodas fundamente universaligi altgradan edukadon en la fabriko en 1967.

Laboristoj verkas

Kuraĝigite de la Ĝenerala Linio de la Partio por socialisma konstruado kaj la situacio de antaŭensalto, kaj sur la bazo de senĉese altigita klereca nivelo, multaj laboristoj verkis el sia riĉa sperto de produktado kaj konstruado teoriajn librojn de scienco kaj tekniko. Dum la pasinta jaro, nur en Ŝanhajo, pli ol 20 specoj de tiaj libroj estis verkitaj de laboristoj, kaj ricevis aprobojn de multaj legintoj.

La dudekelkaj verkoj de laboristoj enhavas temojn diversajn kiel mekaniko, civila inĝenierado, ŝipokonstruo, teksado, kemia industrio, koaksado, malpeza industrio, kaj metiartoj k. c. La urbaj termezuristoj mokenomita antaŭe "strataj etlaboristoj", kolektive verkis la libron "Termezurado de Urba Inĝenierado." La laboristoj de la ledŝua fabriko en Jimiaŭ-distrikto kolektive verkis la libron "Tekniko de Ledŝua Farado" en pli ol 100.000 vortoj. Jang Venhin, laboristo de la Ŝanhaj-a Fabriko de Instrumentoj kaj Metroj, verkis la libron "Esplorado pri la Formo de Sparko kaj Ekzameno de Ŝtalo kaj Fero", kiu estas konsiderata de specialistoj kiel verko

Lerngrupo de gestudentoj de la Pekina Postlabora Televido-universitato en iu Pekina hospitalo. *Foto de Gu Dehua*



ne nur riĉa je spertoj sed ankaŭ bona en teorio. Dum la tutpopola ŝtalproduktado, Liu Ŝutang, ampola laboristo en Ŝanhajo, trovis ke vitro povas esti farata ankaŭ el loeso, kaj li verkis libron pri "Loesa vitro" kun praktika sperto kaj teknika teorio. "Tekniko de desegnograndigo en ŝipkonstruado" verkita kolektive de la laboristoj de la desegno-grandiga sekcio de Hudong-a Ŝipkonstruejo, estas libro de pli ol 400,000 vortoj, laŭdita eĉ de spertuloj en ŝipkonstrua industrio kiel "eksterordinara sukceso en la historio de ĉina ŝipkonstruado."

Plejmulto de tiuj ĉi sciencaj kaj teknikaj verkoj estas kristaliĝo de la kolektiva saĝeco de la laboristoj. La libro "Tekniko de desegnograndigo" naskiĝis post la persista penado de ĉiuj desegnograndigaj laboristoj de Hudong-a Ŝipkonstruejo dum ok monatoj de la varmega somero ĝis la frosta vintro. "La Termezuro de Urba Inĝenierado" estas la kolektiva verko de kelkdek mezuristoj, kiuj persistis verki

dum ĉirkaŭkurado sur altaj montoj kaj sovaĝejoj. La laboristaj verkintoj plene montris en sia verkado fervoregon pri la konstruado de la patrolando, kaj obstinecon por venki malfacilecon.

Ne malmultaj inĝenieroj kaj teknikistoj fervore helpas la laboristojn resumi siajn spertojn kaj ilin altigi ĝis la nivelo de scienca teorio. Ĝu Dahien, unu el la avangardaj laboristoj de la lando, laboranta kun dudek-jara sperto kiel tornisto en la Ŝanhaj-a Maŝina Fabriko, helpate de teknikisto Ding Guohua, verkis la libron "Kiel Mastri kaj Uzi Porcelanan Tranĉilon. La fervora kaj aktiva helpemo de la konstruaj inĝenieroj kaj teknikistoj ankaŭ bone kontribuis al la altigo de la teoria nivelo en la sciencaj kaj teknikaj verkoj de la laboristoj. Ni ĝojas ke multaj laboristoj fariĝis universitataj studentoj, kaj multaj verkis librojn, ke kreskas kaj fortiĝas armeo de laboristaj sciencistoj kaj teknikistoj ruĝaj kaj kvalifikitaj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Ĉiuj por Elektroenergio

Krom multaj grandaj kaj mezgrandaj elektraj stacioj konstruitaj post la Liberiĝo en 1949 kaj jam funkciantaj, tra la tuta Ĉinio disvastiĝas ankaŭ la popolamasa movado de elektro-produkto. En 1959 la kapacito de mezgrandaj kaj malgrandaj elektraj stacioj konstruitaj de la amasoj atingis pli ol 500,000 kilovatojn. Plian disvolvigon oni antaŭvidas ĉijare. Multaj popolaj komunumoj konstruis al si jam elektrajn staciojn. Dank' al tiu en la hejmoj de la komunumanoj brilas elektraj lampoj. Iuj eĉ fundamente realigis elektrigon en agrikulturaj laboroj ekz-e plugado, irigacio, draŝo kaj ceteraj.

Multaj estas la manieroj por funkciigo de elektrostacioj. Krom akvaj kaj fajraj fortoj oni utiligas ankaŭ la ventan kaj la metanan (marĉogasan). Kaj paŝtistoj en Intern-Mongolia Aŭtonomio, utiligas la gason de brutfekajo por produkti elektran energion uzatan por lumigado, melkado kaj lan-

tondado. En Hiamen insuleto de Fugian-provinco, oni konstruis jam la unuan en nia lando tajdan elektrostacion.

Gazeto pri Vejki-o

Vejki-o (sieĝ-ŝakludo), kiu simile al ŝako estas ludata de du personoj per multaj vejki-pecoj blankaj por unu kaj nigraj por la alia alterne almetataj sur la vejki-tabulon dividitan per po 19 paralelaj egaldistancaj linioj rektangule krucitaj, havas en Ĉinio jam historion de pli ol 3,000 jaroj. Ĝi disvastiĝis en kelkaj orientaziaj landoj antaŭ mil jaroj. En lastaj jardekoj oni ĝin lernis ankaŭ en Eŭropaj kaj Amerikaj landoj. Sed antaŭ la Liberiĝo en 1949 sub la reakcia reĝimo, tiu ĉi ludo pli kaj pli malprosperis en Ĉinio. Post la Liberiĝo tiu ĉi ludo ree ekfloras dank' al la prizorgo de la Partio. Tial eka-peras pli kaj pli novaj lertaj vejki-istoj. Por pli bone disvastigi tiun ĉi arton, antaŭnelonge en Ŝanhajo eldoniĝis fakgazeto "Vejki-o". Ĝi estas redaktata de famaj vejkiistoj en Ŝanhajo sub gvido de Ŝanhaja Komitato por

Korpa Kulturado kaj Sportoj. En la unua numero troviĝas noto pri maĉo de modernaj vejkiistoj analizoj pri maĉo de antikvaj majstroj kaj inicaj artikoloj por komencantoj ktp.

Lokaj Fervojoj

Responde al la pli kaj pli kreskanta bezono de transportado en diversaj lokoj ekde 1959 konstruiĝis multaj indiĝenaj fervojoj en Ĉinio. Laŭ statistiko ĝis novembro de la lasta jaro la tuta longeco de tiaj fervojoj atingis pli ol 2,200 kilometrojn.

Tiuj fervojoj utiligis en sia konstruado la indiĝenajn feron kaj ŝtalon produktitajn en la ferŝtal-prdoukta kampanjo en la lasta jaro per indiĝenaj metodoj. Tiaj fervojoj havas avantaĝojn: malpli da investo, granda kapacito de transportado, facila akiro de konstruaj materialoj, facila konstruado kaj sekureco. Tial la fervojoj povis konstruiĝi en mallonga tempo kaj rapide pligrandiĝas la eblecojn de mallongdistanca transportado.

Paŝosignoj de Progreso

Leviĝis ruĝa flago

VANG Juanbi, havis nek filon, nek filinon, tamen sopiradis starigi lernejon.

Pri la kialo de tio oni certe povas fari diversajn supozojn. Sed unu okazintaĵo, kiu motivis en Vang Juanbi tian deziron, estas por li neniam forgesbla: Antaŭ pli ol tridek jaroj, kiam li sukcesis, venkinte multajn malfacilojn, fini sian elementan lernadon kaj estis preta studi en mezlernejo, oni diris al li en la lernejo: "Pŕ tiu kiu fekajkorbon portas, ne povas esti bela perspektivo tra la tuta vivo." Sekve do, li revenis hejmen. Post la liberiĝo de la lando, Vang Juanbi, jam pli ol kvindek-jara, komencis sonĝi "lernejan sonĝon".

Kaj hazarde, ĝuste tiam aperis laboro pri lernejo. Lutage, dum la granda antaŭensalto en produktado, kiam Vang Juanbi hejmeniris post partopreno de la kunveno de kulturaj aktivuloj de la gubernio, li renkontis survoje Ĉen Tongju, junulo kiu sin okupis pri la kulturaj kaj amuzaj agadoj en la vilaĝo. Tiu ĉi rekte lin alparolis: "Dua Onklo Biĉjo, nia vilaĝo fondos agrikulturan mezlernejon, kaj la komitato de la Partio de la popola komunumo deziras ke vi estu unu el la membroj de la komisiono por starigo de lernejo."

Tion aŭdinte, Dua Onklo Biĉjo tamen surpriziĝis: "Fondi mezlernejon? Ĉu eblas? Necesas domo, necesas tabloj kaj seĝoj, necesas mono!"

Efektive, post kiam li atingis sian hejmon, la sekretario Ŝuaj de la partia komitato lin venigis al si kaj diris: "Ni estas pretaj establi mezlernejon sen elspezo de mono, lernejon en kiu la lernantoj studos kaj ankaŭ partoprenos produktadon. Vi, kiu fervore sin dediĉas al publikaj aferoj, estu do unu el la membroj de la komisiono por starigo de lernejo."

En la nokto de tiu sama tago, Dua Onklo Biĉjo, absorbata de la tasko, enpensiĝis longan tempon kaj

ne bone dormis. Frue en la sekvinta mateno, li iris viziti la kvar najbarojn loĝantajn apude en sesĉambra domo, kies fenestroj rigardis suden kaj ĝuis sufiĉan sunon. Kaj antaŭ la ĉambroj troviĝis vasta spaco, ke oni povis rigardi malproksimen preskaŭ je unu kilometro. Li trovis ke ili estis ja tre taŭgaj por lernejo.

Unu el la kvar najbaroj estis komercisto, kiu promesis forlasi siajn ĉambrojn se li povus trovi por lia vendejo alian lokon. Ankaŭ aliaj du najbaroj, maljunulino Gu kiu havis familianon en militservo kaj familio Ŝang konsentis transloĝiĝi. Dua Onklo Biĉjo certigis al ili, en nomo de la komunumo, ke oni donos al ili interŝanĝe bonajn ĉambrojn. Sed la kvara najbaro, familio Vang, ne volis transloĝiĝi, dirante ke, antaŭ ol fari la decidon, ili devas interkonsiliĝi kun iu parenco loĝanta en la urbo.

Rifuzite, Dua Onklo Biĉjo tuj sin turnis al la urbo. Unuspire li iris dek kvin kilometrojn kaj trovis la parencon de la familio Vang. Tiu ĉi diris: "Mi konsentos se vi donos interŝanĝe tri ĉambrojn kun tegola tegmento." Post ekruĵo de siaj okulgloboj, Dua Onklo Biĉjo akceptis senhezite liajn kondiĉojn.

Li faris tiun promeson ĉar ĝuste li mem havis tri ĉambrojn kun tegola tegmento. Reveninte hejmen, li elmetis kaj amasigi siajn meblojn kaj aliajn objektojn en la budon por akvoĉerpilo, por doni sian loĝejon al la familio Vang.

En la vespero, kiam Dua Onklo Biĉjo finis kunvenon kaj hejmeniris kun du junuloj, ĉi tiuj, ĉe la vojkruciĝo, unu sin direktis orienten kaj la alia okcidenten. Restis Dua Onklo Biĉjo sola. Nur nun li ekmemoris ke li jam ne havas hejmon. Li ekfrapis al si la kapon kaj murmuris: "Por la lernejo, mi devas tion forspiti!" Fine, li pasigis tiun nokton ĉe iu najbaro.

Tio tamen ne estis ĉio. Por varbi geknabojn al la lernado, li kuradis tien kaj ĉi tien eĉ dum manĝado, kun rizpelteto en la mano. "Vi plendadis ke mankas al viaj infanoj ebleco lerni en lernejo. Nun la agrikultura mezlernejo estas starigita, kial vi preterlasu la ŝancon?" Per unu fojo li sukcesis varbi pli ol dudek lernantojn. La komitato de la Partio en la komunumo invitis abiturienton instrui en la lernejo. Tiamaniere, la lernejo komencis funkcii post klopodo dum tri tagoj kaj tri noktoj, kaj oni elspezis pro ĝi entute ne pli ol dudek cendojn, por aĉeti skatolon da kretoj.



La 8-an de marto de 1958, en la popola komunumo Ŝuangloŭ de Haj'an-gubernio, Giangsu-provinco, levigis ruĝa flago de agrikultura mezlernejo.

Nun Dua Onklo Biĉjo transloĝigis en la lernejon. Li establis lernejon ne ordinaran kaj ankaŭ per rimedo neordinara.

De 1 al 217

LA 20-an de junio de 1958, en la agrikultura mezlernejo Jaŭkiaŭ, Ĝengiang-municipalo, eksonoris por la unua leciono.

Kvankam la lernejo situas en la mansardo de kaduka templo, la pupitroj estis faritaj el pordebaroj kaj la benkoj, el brikoj, He Juven estis plena je entuziasmo, ĉar, finfine, la lernejo komencis funkcii. Li, malriĉulo, antaŭe malestimata ekde sia infanaĝo, nun estis instruisto de agrikultura mezlernejo.

Sed baldaŭ li renkontis malfacilaĵojn: ĉiu el la 22 lernantoj, kiuj sidis antaŭ li, havis sian propran ideon. La lernantoj fariĝis maltrankvilaj, aŭdinte jenajn vortojn de siaj gepatroj: "Mezlernejo sed kun adjektivo 'agrikultura', kio tio estas?"

Novajo alvenis al Jaŭkiaŭ: oni varbas metilernantojn en la urbo Ĝengiang. Tion aŭdinte tuj tumultiĝis la lernantoj de la agrikultura mezlernejo.

Ĉiu tage estis lernantoj kiuj prezentis peton al He Juven: "Sinjoro instruisto He, skribu al mi pruvilon ke mi ne estas lernanto de la agrikultura mezlernejo, ke mi povu partopreni la ekzamenon por metilernantoj."

Vidante ke la instruisto ne konsentas, iuj el la lernantoj diris: "Mi ne venos plu. Kiam mi ne lernos ĉi tie, mi estos permesata partopreni la ekzamenon."

Efektive, la lernantaro malgrandiĝis tagon post tago. Komence vizitis la lernejon nur pli ol dek personoj, poste, eĉ malpli ol dek. Iun posttagmezon, kiam He Juven venis al la klasĉambro je la kurso-horo, li trovis en ĝi nur unu lernanton, He Vanĝong.

"Nur unu lernanto?" He Juven estis tiel maltrankviligita ke li ekŝvitis tutkorpe. Li rapide kuris al la pordego de la templo por rigardi—aperis neniu el liaj ceteraj lernantoj. Tiuj kiuj preterpasis estis lernantoj sin direktantaj al la najbara elementa lernejo.

Dume, He Vanĝong pensis ke kredeble ĉesas jam la kurso kaj, metinte la librojn sub sian brakon, li ekiris eksteren. Sed la instruisto lin vokis: "Atendu, reiru al via sidloko."

Ekster la klasĉambro, He Juven fine decidis, post akra luktado en la penso: "Se hodiaŭ mi ĉesus instrui, ankaŭ tiu ĉi lernanto morgaŭ ne plu venos,"



Vekiĝo de la Montoj

Lignogravuraĵo de Hinbo

"Se ĉeestas eĉ nur unu lernanto, devas funkcii la lernejo!"

La unika lernanto sidis trankvile sur sia sidloko; la instruisto serioze enpaŝis la ĉambron kaj diris: "Hodiaŭ ni daŭrigas la lernadon de la leciono 'La Malsaĝa Avo translokigas montojn.'" Kaj tiel pasis sinsekve la lecionoj de Han-lingvo, aritmetiko, agrikulturaj scioj. . . .

En aŭgusto okazis en la provinca ĉefurbo kongreso de reprezentantoj de agrikulturaj mezlernejoj, en kiu He Juven garantiis al la kongresanoj: "Kvankam hodiaŭ mi havas nur unu lernanton, mi estas certa ke mi havos cent en la venonta jaro!"

Dank' al la subteno de la *hiang*-a* Partia komitato, disvolviĝis propagando en Jaŭkiaŭ pri la avantaĝoj de la agrikultura mezlernejo. En la daŭro de unu monato, sin anoncis pli ol cent lernantoj. Nun, unu jaron poste, la lernantaro de la Jaŭkiaŭ-a agrikultura mezlernejo sumas 217, el kiuj ĉiuj lernas persiste.

He Juven diradis: "Fajrero povas stepon bruligi. Se ni aŭskultas al la Partio, ni neniam eraras."

* *hiang* — ĉina administra unuo sub gubernio.

“Kion la popolamaso plej bezonas, tion mi estas preta esplori.”

Jen la vortoj, kiujn Zeng Ĵujguang, la “agronomiisto” el kamparanoj, skribis en la fronta paĝo de sia notlibro, kiam li komencis marŝon al la natura scienco en 1950. Tiuj ĉi vortoj montris la direkton kaj celon de lia scienca esplorado. Dum la pasintaj naŭ jaroj, laŭ tiu ĉi direkto, li elkulturis pli ol dek novajn speciojn de kortbirdoj kaj plantoj, kiel “ruĝe kapuĉita koko”, “griza longhara kuniklo”, kaj “Ginnong-nikotiano Nro 1”. Sub lia kulturado, la kokinoj estas riĉaj je viando kaj fekundaj je ovoj, la kunikloj delikataj je haroj, kaj la nikotiano bona je kvalito kaj riĉa je rikolto, kies maturperiodo estas plie, multe mallongigita. Li donis ekzemplon de la renovigo de produkta procedo por la loko. Antaŭ nelonge li ekokupis sin plie pri eksperimentoj de “durikoltoj de arakido en unu jaro”. Iuj eksperimentoj atingis jam unuajn sukcesojn, kaj aliaj estas florantaj kaj fruktiĝantaj.

Zeng Ĵujguang estas la sekretario de la Partia Komitato de la Ruĝflaga Komunumo ĉe Ginŝa-gubernio, Kjuĝoŭ-provinco. Li laboras en la kampo ekde sia juneco, kaj havis nur klerecon de elementa lerneĵo, tamen sub edukado de la Partio kaj

Zeng Ĵujguang (la dekstra) resumas kun tabakokulturisto Jang Ŝaŭlin la spertojn en kulturo de altprodukta Ginnong-nikotiano n-ro 1.

Foto de Ĝeng Zude



Ĉang Ĉiling:

Entrudiĝinte la

subteno de la amaso, post kelkjara studado, nun li jam entrudiĝis en la pordon de natura scienco.

Libro Estas Verkita Ankaŭ de Homo

La regulan studon de natura scienco, Zeng Ĵujguang komencis per siaj eksperimentoj laŭ la materialoj el libroj. Ekzemple, por lia eksperimento pri aŭtuna terpomo la vojon kondukas la “Agrikultur-biologio” de Lisenko, kaj lia plantado de aŭtuna tritiko estis inspirita de la metodo de traktado de semoj per kalio-permanganata (KMn O₂) solvaĵo el la “Elektitaj Verkoj de Miĉurin”. Post kelka tempo, li trovis ke multaj novaj problemoj de produktado estas ne tute aŭ tute ne traktitaj en libroj. Kaj li devis sin turni al vojoj aliaj ol libroj. Tiel fariĝis al li nature, ke li fidis sed ne blinde kredas al libroj. En 1954, li legis en la “Ĉina Agrikultura Gazeto” artikolon pri nutrado de porkoj per olerekremento. La artikolo informis ke kolzo-sema kuko (rekremento post elpremo de oleo) uzata kiel nutraĵo por porkoj devas esti kvante limigita al 15% el la totala nutraĵo, kaj ne pli ol duonan ĝinon ĉiutage por ĉiu porko. Ĉar la kolzo-sema kuko enhavas ian tokson, kiu, se donita tro multe, kaŭzas lakson al porkoj. Tiam li ekpensis, se limigo estas kaŭzita de la tokso, kial oni ne provas ĝin antaŭforigi? Kiam li decidis fari la eksperimentadon, kune kun iu bredisto kiel sia helpanto, oni admonis lin dirante, “en libro ja estas klare skribita ke nur duonan ĝinon oni povas doni potage al ĉiu porko, kio utilas por vi fari ankoraŭ eksperimenton?” Zeng Ĵujguang ne refutis, sed pensis en si: “Ĉu la libro ne estas verkita ankaŭ de homo, kial ĝi estas ne tuŝebla?” Li provis multajn rimedojn por forigi la tokson, sed ne sukcesis. Fine, li ekmemoris, ke kiam oni uzas kolzo-seman oleon en kuirado, ofte venas el ĝi malbonodoro. Tio, tamen, estas forigebla, se oni superaspergas iom da akvo sur la oleo post varmigo. La metodo forigi la venenon per varmiga procedo iom post iom maturiĝis en lia kapo. Post kelkaj provoj, li sukcesis. Per tiu ĉi metodo, oni povas nutri unu porkon per kolzo-sema kuko ĝis kvin ĝiĉoj ĉiutage. En daŭro de unu jaro, ili grasigis 800 porkojn per pli ol cent specoj de sovaĝaj plantoj, kiaj kolzo-sema kuko kaj multaj aliaj, sen uzado de grajno da greno. Poste, la aŭtoro de la supre menciita artikolo faris ŝanĝojn

Ordon de Natura Scienco

en sia verkajo, kiam ĝi aperis en libra formo, surbaze de lia eksperimentado.

Amu Kion Oni Studas

Zeng Ĵujguang faras siajn eksperimentojn kun ĉiam pli granda intereso kaj ankaŭ lia studkampoj ĉiam pli vastiĝas. Li ofte tutan tagon restas kaŭrante en la terkulturejo kaj estas kovrata per ŝvito kaj koto. Kiam li reiris hejmen, li longtempe kliniĝis super sia skribotablo, absorbita en studado. Vere, li prizorgis siajn dorlotitojn plej amplene. Dum lia eksperimentado pri la interkruciĝo de Angola kuniklo kun la loka mallonghara kuniklo, li plurfoje ellitiĝis nokte por ilin pririgardi timante ilian malvarmumon kaj malsaton. En la aŭtuno de 1953, li aĉetis de Kujjang-a bestbredejo du *Yorkshire*-ajn porkojn, kiujn li kunportis al Ĝinŝa per ŝarĝa vagonaro sentegmenta. Tiutage, la suno fajrruĝe brulis, oni sentis eĉ varmon netolereblan, nenionfarante en domo. La porkoj anhelis pro varmeĝo de la suno, kaj akvo ne estis trovebla. Li portis kun si kelkajn ĝinojn da piroj por kvietigi sian soifon, sed rezulte ilin li tute donis al la porkoj.

Ĉiuj Eksperimentoj pro la Bezonoj de la Patrio

La plej elstara karaktero de la scienca eksperimentado de Zeng Ĵujguang estas tio, ke li faras ĝin laŭ la vidpunkto de praktika utilo kaj bezonoj de la patrio. Ekzemple, liaj eksperimentoj pri "durikolta arakido" kaj *diŝangfeng* estas farataj responde al la Partiaj alvokoj "por tutforta disvolvo de la porkobredado kaj pliproduktigo de oleoplantoj."

Ĝinŝa-gubernio estas loko taŭga por arakida plantado, sed laŭ tiea kutimo, oni plantas arakidon kaj maizon en la sama sezono tiel ke plantado de unu ekskluzivas tiun de la alia. Zeng Ĵujguang pensis, se oni sukcesus plilongigi la periodon de arakidsemado, tiam oni povus ĝin kreskigi post la rikolto de maizo, la greno kaj la olea planto ambaŭ povus doni riĉan rikolton. Li elektis specon de malgranda arakido de vertikala tipo, kaj faris eksperimenton semi ĝin diverstempe en julio, aŭgusto kaj septembro, kaj sukcesis. La penso pri eksperimento de *diŝangfeng* venis al li kiam li nutris porkojn per brasiko. Ĝi estas bona nutraĵo por porkoj, sed estus pli bone se ĝiaj radikoj kaj folioj povus esti

Zeng Ĵujguang elkulturis specon de koko, kiu estas kompare pli grandkorpa, multprodukta je ovoj, rapidkreska kaj rezistema al malsanoj.

Foto de Ĝeng Zude

ankaŭ mangataj. Tial, per interkruciĝo de brasikrapo kun brasiko kaj rapo kun ĉina brasiko, li akiris du novajn speciojn, kiuj estas brasiko kaj ĉina brasiko supre kaj brasikrapo kaj rapoj malsupre respektive. Li donis al tiaj plantoj signifoplenan nomon *diŝangfeng* (ambaŭ riĉaj je la supro kaj malsupro).

Dume, li ankaŭ faris diversajn aliajn eksperimentojn de interkruciĝo de sovaĝa *jisi-o* (*coix agrestis*) kun la kulturita (*coix lacryma*), kaj ricina silkraŭpo (*attecus anindia*) kun kverka silkraŭpo

(*antheraea pernyi*), celante transformi *jisi-on* en multjaran planton, kaj akomodi la ricinan silkraŭpon al naturkondiĉoj de la montara regiono de Gujĝoŭ-provinco klimataj kaj nutraj.

Obstino en Lernado

Pro la malalta nivelo de klereco, la komparana agronomiisto alfrontis tre multajn malfacilaĵojn kaj amarajn fiaskojn en siaj studoj kaj eksperimentoj. Kiam li komencis legi sciencajn librojn kiaj "Elektitaj Verkoj de Miĉurin" ktp., li renkontis multajn nekonatajn vortojn kaj terminojn, kaj foje kaj refoje devis peti la helpon de aliaj. Kiam neniu helpanto estis apude, li povis nur preterlasi ilin aŭ pene decifri por nur konjekti la ĝeneralan ideon el la kunteksto. Ofte li studadis kun streĉo ĝis profunda nokto. Kiam li havis malfacilajn problemojn en kampaj laboroj, li ĉiufoje vizitis multajn maljunajn kamparanojn por peti klarigojn kaj konsilojn. Kiam ajn li estis en malfacila situacio, ĉiam la gvidantoj de la Partio venis la unuaj lin subteni, kuraĝigi kaj firmigi lian memfidon. Respondeculoj de la provinca, distrikta kaj gubernia Parti-komitatoj donis al li multe da konsiloj, kaj solvis por li multajn konkretajn malfacilaĵojn. Kaj li neniam submetiĝis al la mal-



facileco aŭ sin retiris pro malsukceso. Li ofte diras: “La plej granda malamiko de scienca studo estas manko de persisteco: oni povas sukcesi nur se oni ne timas malsukceson.” Tiamaniere, Zeng Ĵujguang decideme sintrudis en la pordon de natura scienco. Nun, li faris novan planon por la jaroj 1960-1962,

enhavantan 58 studobjektojn. “Mi laboris nur tre malmulte,” li diris, “kaj la Partio kaj la popolo jam donis al mi tiom da honoro. Kiel mi povus rekom-penci la edukadon donitan de la Partio kaj la pri-zorgon montritan de la popolo, se mi ne bone farus miajn laborojn kun plena energio?”

Ĉen Hongming*:

Mia Dekjara Lernado

EN la malnova socio, mi estis malriĉa laboristo, kaj lernis nur unu jaron ĉe privata leciono-donanto kaj kvar jarojn en elementa lernejo. Post la Liberiĝo, ni, la sklavoj de la malnova socio fariĝis mastroj de la nova socio; la Partio senĉese min edukis, kulturis kaj faris min gvidanta funkciulo en ŝtata entrepreno. Lernejoj kiujn povis viziti nur gefiloj de riĉuloj en la malnova socio, larĝe malfermiĝas nun al ni devenintaj de laboristaj aŭ kamparanaj familioj. Dum la pasintaj dek jaroj, la Partio ĉiam zorgis kaj helpis min en la lernado, tiel ebligis al mi altigi mian klernivelon de elementa lernejo ĝis universitato. Pro la leviĝo de mia nivelo de klereco kaj labora kapablo, mi estis nomita inĝeniero de la ŝtato en 1954. Kiam mi rememoras pri miaj malfacilaj jaroj en la pasinteco kaj pri la edukado kaj kulturado al mi donitaj de la Partio, kiom multe da vortoj mi ja havas sub mia lango kaj kiom multe da sentoj en mia koro! Sen la Partio, mi tute ne havus la hodiaŭan vivon; la hodiaŭan honoron. Al la Partio kaj Prezidanto Maŭ mi elkore ĉion dankas!

La Partia Komitato de Ĉengdua Fabriko de Transportaj Maŝinoj tre multe atentis pri sia postlabora lernejo. Jen k-do Joŭ Ĝengguo, la ĝenerala sekretario (la unua dekstre), diskutas kun la instruistoj kiel plibonigi la instruon laboron.

Foto de Gin Mianki



Mi naskiĝis en familio de malriĉa kamparano. Ekde mia infanaĝo mi vivis pli malbone ol brutoj povante nur rigardi envie la infanojn de riĉaj familioj vizitadi lernejon. Nur kiam mia pliĝa frato laboris aliloke, mi ekhavis ŝancon lerni unu jaron ĉe privata lecionodonanto kaj kvar jarojn en elementa lernejo dank' al lia monhelpo. Estis ne finrakontebaj la malfacilaĵoj por malriĉaj infanoj vizitantaj lernejon. La lernejo estis malproksima de la hejmo, la aliaj povas manĝi en la lerneja manĝejo, dum mi povis nur kontentiĝi je mucida manĝaĵo el brano kaj sovaĝa legomajo, ne havante monon por aĉeti paperon kaj skribilon, mi ĉiam faris skriban ekzercon sur arbofolioj per herb-radiko. Kaj poste, kiam la kampara ekonomio plue bankrotis, mi devis nur interrompi mian lernadon. En la jaro kiam mi estis 17 jaraĝa, mi iris al Dalian por fariĝi metilernanto. Mi vidis tiam kiel oni faras desegnon, kaj aŭdis parolon pri ŝraŭboj, kiujn oni distingis laŭ mezuro en coloj kaj ties subdividoj. Ĉion ĉi tion mi trovis tre nova kaj mirinda. Mi nebulece sentis ke la problemo de tekniko estas ne simpla, tiu kiu posedas teknikajn sciojn, posedas por si feran manĝvazon nerompeblan de senlaboreco, mi kaŝe faris por mi decidon lerni la teknikon. Mi aĉetis la libron “Manlibro por stablistoj”, kaj ĝin legis en la hejmo de mia metimajstro, post laboro. Tiujn tabelojn kaj formulojn en la libro mi multfoje legis sed ne komprenis. Mi petis helpon de la majstro, sed li ne scipovis legi, kaj klarigi ne kapablis. Post tio, mi instruis al li legadon kaj li instruis al mi la teknikon, kies kialon li tamen ne povis klargi. Mia decido lerni la teknikon estis nur kompatinda revo en tiu tempo.

Post la Liberiĝo, ni laboristoj fariĝis mastroj de la lando, la Partio senĉese edukas nin ami kaj prizorgi nian fabrikon. Tiam mi laboris kiel riparisto. Kiam malfunkciis maŝino, oni devis trovi

la kaŭzon; por ĝin flegi oni devas eltrovi rimedojn. La gvidantaj kamaradoj ofte petis min kunstudi teknikajn problemojn. Pro mia malalta klereco multe da malfaciloj mi renkontis en mia laboro. Prenu desegnolegadon kiel ekzemplon, mi kapablis el tio sciiĝi nur la ĝeneralan konturon laŭ miaj laborspertoj, sed ne la detalan strukturon de la objekto kaj ĝian principon, des pli malfacile estis por mi malkovri kaŝitajn en ĝi demandojn. De problemoj teoriaj, kiujn mi renkontis en la laboro, mi sciis nur la tielon, tute ne la kialon. Ĉiuj faktoj kondukis min al la konkludo, ke por posedi teknikon oni devas unue konkeri la "citadelon" de klereco kaj scienco. En tiu direkto mi eklernis memstare la lecionojn pri ĝeneralaj scioj. Post 1950, la Partio fondis por ni diversformajn lernejojn postlaborajn, mi restas ĝis nun lernanto de tiuj lernejoj. Mi memoras ke kiam mi la unuan fojon paŝis en la postlaboran lernejon, en mia koro bolis svarmo de diversaj pensoj kaj sentoj. La malnova socio ne donis al mi ŝancon por lerni, sed nun la Partio kreis por mi bonajn kondiĉojn por lernado. Mi profunde sentas ke ne estas simpla afero eniri la klasĉambron kun librosako en la mano, en tio ĉi ja enkorpiĝas la zorgemo pri kulturado kaj profunda espero, kiujn la Partio havas por kaj en ni.

La Partio tiam promociis min laboreja estro kaj estro de la fabriko. Ke simpla, sensignifa laboristo el la malnova socio fariĝis nun gvida funkciulo de ŝtata entrepreno, estas ja efektive ŝanĝo ĉielrenversa. Pensante pri tio, mi ĉiam sentas ke mi tro malmulte laboris por la Partio, kaj tro malmulte scias por renkonti la bezonojn de mia laboro. Ĉu mi tiel malpravigu la konfidon de la Partio? Ne, absolute ne! Ju pli grava estas la prirespondata laboro, des pli necesas la lernado de mi komencita, kaj des pli obstine mi devas persisti en ĝi. Mi lernis de Sovetia kamarado spertojn de administrado de entrepreno, de laboristoj kaj teknikistoj teknikajn sciojn de produktado. Mi longtempe persistis al sistema lernado de ĝeneralaj scioj en postlabora lernejo, kiu multe plivastigis miajn sciojn. Kaj antaŭ projektaj desegnaĵoj prezentitaj de teknikistoj mi jam ne plu konfuziĝas de tiuj linioj, kaj kapablas fari ekzamenon kaj reviziojn. Mi ordinare studas produktan teknikon kune kun laboristoj, aplikante la teorion en solvado de praktikaj problemoj; la lernado antaŭen puŝas mian laboron, kaj inverse tio pli firmigas mian kredon kaj decidemon en lernado. Mi profunde konscias, ke "lerno — laboro — lerno" estas procezo de reciproka akcelado kaj senfina alternado, en kiu la Partio ĉiam donas al mi varman kuraĝigon kaj grandan subtenon. La gvidantaj kamaradoj de la urbo ĉiufoje pridemandas mian lernadon kiam ili venas al mia fabriko. Ofte en la vesperoj, en kiuj mi devas preni lecionon, la Partia organizo de la fabriko helpas min liberigi de miaj laboroj, ne mankas kamaradoj kiuj meminciate

faras ilin anstataŭ mi. Estas neimageble por mi persisti en lernado dum kelkaj jaroj, sen prizorgo kaj helpado de la Partio.

Dum preskaŭ dek jaroj ekde 1950 ĝis nun mi ne interrompis la lernadon. En la komenco, mi lernis fizikon por malsupera gimnazio ĉe Lju-Da Koresponda Lernejo. Poste, kiam tiu lernejo ne plu akceptis urbanojn, mi eklernis plue en la distrikta postlabora lernejo; sed post ne longe tiu ĉi lernejo fermiĝis, mi transiris en la postlaboran mezlernejon de Dalian-a Kvara Gimnazio por lerni la nacian lingvon kaj matematikon. En 1955, mi eklernis ŝturme la malsupergimnazian kemion helpate de iu teknikisto en nia fabriko por partopreni la eniran ekzamenon de la klaso de supera gimnazio de la vespera sekcio de la Dalian-a Teknika Kolegio, de 1957 mi eklernas en klaso de la kolegio.

Dum mia studado, mi havis multajn malfacilojn, kiujn mi venkis helpe de la organizadoj de la fabriko kaj de la profesoroj. Okupante respondecan postenon en la fabriko mi devis ofte partopreni diversajn kunvenojn kunvokitajn de la urbaj instancoj. Por kiel eble malplej esti malhelpata en lernado, mi ĉiam portis kun mi lernolibrojn kaj notlibrojn kiujn mi devis uzi en la vespero; se necese ankaŭ volvon da desegnopaperoj, kiujn ne povis enteni mia ŝtopita librosako. Tiel mi povis rapidi al la lernejo tuj post la kunveno. Ofte mankis al mi tempo por manĝi, kaj mi devis mordi la kunportitan sekan nutraĵon dum lecionopaŭzo. Kelkfoje la kunvenoj finiĝis je la 7a eĉ 8a horo vespere, tamen se nur restis tempo por la lasta leciono, mi ankaŭ tien iris tuj post la kunveno, por aŭskulti la lecionon tiom kiom mi nur povis, kaj post la leciono, kiam ĉiuj foriris, mi restis tie kaj petis de la profesoro kompletigon de la leciono. Dum la pasintaj dek jaroj, mi neniam forestis pro malfrua finiĝo de la kunvenoj. La plej granda malhelpo al mia lernado estis ne malofta forveturo pro la fabrikaj

Ĉen Ŝugen, laboristino de Harbina Medikamento-fabriko, jam havas kultur-nivelon de mezlernejano dank' al sia postlabora lernado. Jen ŝi helpas unu el siaj 4 infanoj lerni aritmetikon.

Foto de Zong Bajji



aferoj, en la unua duono de la jaro 1959, mi forveturis kvar fojojn, el kiuj unufoje ĝi daŭris du semajnojn. Post kiam mi revenis de mia vojaĝo mi ĉiam klopodis rekompolti la malĉeestitajn lecionojn, kaj samtempe persisti en lernado de la novaj ĉe kiuj, la unuan fojon, mi preskaŭ nenion povis kompreni el la lekcio, sed mi obstine penis noti la aŭskultitan lecionon. Tio estis tre seka laboro, sed mi ĉiam devigis min koncentrigi la atenton ĝis la fino. Ĉar foja aŭskultado tamen donis al mi certan impreson kiam mi revenis al ĝi legante laŭ la lernolibro, la impreso fariĝis iom post iom, pli klara kaj pli profunda dank' al senĉesa remaĉado. La problemojn nesolveblajn, mi notis en kajeron, por peti helpon de la profesoro la venontan fojon. Tiamaniere mi povis duone kompreni la sekvan lecionon kaj en la tria leciono mi jam povis kompreni egale bone kiel la aliaj studentoj. En tia okazo, la plej grava afero laŭ mi estas fermi al si ĉiam malantaŭan pardonon aŭ retroirejon, oni devas nepre strebi kun plena forto por reatingi la perditan distancon, alie la distanco fariĝus ĉiam pli granda, ke fine oni povus nur ĉesigi la lernadon.

Komence de mia studo en la kolegia klaso, mi ne sufiĉe taksis la kompleksajn de la lernobjekto, malofte mi faris restudon kaj lernan taskon post lernohoroj. La unuan fojon de ekzameno mi ricevis nur noton 3. Poste laŭ la konsilo de la profesoro, mi donis sufiĉan atenton al restudo kaj lernotaskoj. En mia fabriko nur mi sola lernis en la kolegia klaso, mi ne havis kunlernanton dum restudo por interhelpi, ofte mi devis longe kaj ripete cerbumi kaj operacii, por trovi la ĝustan solvon, en iuj okazoj mi ne sukcesis eĉ post tri kvar-hora cerbumado. La perdita tempo min tre ĉagrenis. Sed mi opinias ke por solvi malfacilajn problemojn, oni devas esti neŝanceleble firmvola kaj decideme nefleksebla kiel por konkuri bastionon. Mi ankaŭ saltis de ĝojo, kiam mi solvis unu malfacilan problemon, post streĉa pensado. Dank' al sufiĉa atento pri la hejmaj restudoj kaj taskoj, mi akiris noton 5 en la fina ekzameno de la alta matematiko.

Por partopreni la postlaboran lernadon plej malfacile certigebla estas la tempo. Precipe ĉe mi, kiel gvidanta funkciulo en fabriko, ne nur dum laborohoroj ne troviĝas iom da libertempo por lerni, eĉ en

La Nigran Drakon Mi al la Karuloj Kontribuas

— Popolkanto el Pekino —

Ilustris Ĝoŭ Lingĝaŭ

*Ni karboministoj havas decideman koron,
profunde sub la tero fosas nigran oron.*

*Ĉiu pec' da karbo unu koron reprezentas,
ruliĝe karbo-ond' antaŭen flugtorentas.*

*Karb-ondo, kvazaŭ nigra drak' torente kuras,
rajdante sur la drak' mi al Pekin' veturas.*

*La nigran drakon mi al la karuloj
kontribuas,
kiuj sur Tian-anmen* paradon de sukces'
revuas.*

* Tian-anmen (ĉielpaca pordego) estas la pordego sude de la malnova Imperia Palaco en Pekino, antaŭ kiu okazas ĉiujare la grandaj manifestacioj okaze de la Nacifesto kaj Maj-unua Festo.

Esperantigis Laŭlum



tiuj vesperoj kiam mi ne havis lecionojn por ricevi en la kolegio, tempo estis tamen okupata de diversaj kunvenoj kaj aktivadoj. La tempojn por tagmeza ripozo kaj por lernado de politika teorio unuece fiksita de la organizo, kutime mi uzis por lerni la teorion kaj legi ĵurnalojn. Kion fari? Nenion alian krom racia kaj ĝusta aranĝo de mia persona vivo. Ĉiumatene mi ellitiĝas tre frue, ke post la matenmanĝo, restas ankoraŭ pli ol unu horo antaŭ la laboro. Tiun tempon mi uzis por lernado. Kvankam estis jam en la profunda nokto kiam mi forlasis la klasĉambron, mi tamen ne tuj enlitiĝis sen restudo de la lernita objekto dum la vespero. En la dimanĉo, kunpremante la tempon por personaj bagatelaj aferoj, mi sukcesis disponi tutan antaŭtagmezon por lernado. Mi konstatas, ke la plej grava afero en postlabora lernado estas longdaŭra persistado por

formiĝo de kutimo. Kvankam mi havas nur pli ol unu horon ĉiumatene, sed longdaŭre, la tempo sumiĝas je 2-3 cent horoj en unu tuta semestro. Cetere, dum lernado, oni devas senĉese batali kontraŭ la pasivaj elementoj en la propra menso. Mi ne havas bonan sanon, kaj ofte mi devas legi kuŝante. Mi iam pensis ke mi estas jam maljuna kaj malfortikiĝanta kun la tago, kaj jam ion atingis en lernado, kial plu penadi? Tamen mi pensis, se hodiaŭ mi forlasus la lernadon, ĉu morgaŭ ankaŭ la laboron? Lerno estas por la laboro, do same tasko donita de la Partio, ĝin forlasi mi ja ne rajtas!

* *Direktoro de Ljuda-a Prilaborejo de Maraĵ Produktaĵoj kaj lerno-modelo de la Vespera Sekcio de Dalian-a Teknika Kolegio.*

Vang Kjan:

Kantantoj pri Socialismo

Nun mi konigas al vi tri laboristajn verkistojn, nove kreskin-tajn en Ĉinio. Ili ĉiuj laboras en Ŝanhajo kaj nomiĝas Hu Vanĉun (laboristo de Ferŝtala industrio), Fej Liven (meĥanika laboristo) kaj Tang Kehin (ŝpinteksisto).

El ĉi tiuj tri verkistoj Fej kaj Tang estas membroj de la Ligo de Ĉinaj Verkistoj kaj Hu estas ano de ĝia Ŝanhaja Filio. Ili komencis verkadon preskaŭ samtempe, antaŭ apenaŭ 6-7 jaroj. Sed iliaj vigleco de krepovo kaj literatura genio reliefe montriĝas jam en la verkoj. Ĝis la unua duono de la jaro 1959 Hu Vanĉun publikis jenajn kolektojn de skizoj: "Juneco", "Komenco de Amo" kaj "Kiuj estas la kreantoj de mirakloj", filmscenaro "Familio de ferŝtalaj fandistoj". Fej Liven publikis kolektojn de skizoj "Kreskado" kaj "Konkurso ne finita" kaj filmscenaro "Ŝtalaj Homoj" kaj "Spuroj en ŝipkonstruejo". Tang Kehin publikis kolektojn de skizoj: "Printempo en laborejo", "Mia meti-majstro" k. a. Iliaj verkoj estas multe ŝata-

taj de la vasta legantaro. La kolekto de skizoj "Komenco de Amo" de Hu Vanĉun eldoniĝis en 1958 je 50,000 ekzempleroj, kaj post nur kelkaj monatoj, en februaro de 1959, oni ĝin reeldonis je 35,000 ekzempleroj. Lia novelo "Osto kaj karno" (1955 j.) gajnis honor-diplomon de la Internacia Literatura Konkurso de la Sesa Tutmonda Junulara Festivalo en 1957. Iuj verkoj de Tang Kehin estis eĉ tradukitaj en fremdan lingvon. El tiuj ĉi faktoj jam klare montriĝis, kiom granda ŝanĝo okazis en Ĉinio kaj ke la laborista klaso kaj laboranta popolo ne nur fariĝis mastro de la lando, sed fariĝos mastro de kulturo. La socialisma sistemo malfermas larĝan vojon por svarma aperado de laboristaj kaj kamparanaj verkistoj. La vaste disvolviĝanta movado de kultura revolucio, likvido de analfabeteco kaj universaligo de edukado, donis firman bazon al la literatura kreado de laboristoj kaj kamparanoj. En nia epoko, da laboristaj kaj kamparanaj ver-

kistoj amase naskiĝas ne kelke, nek kelkdekoj, sed centoj kaj miloj.

Estas tre interese, iom studi la literaturan kreadon de ĉi tiuj laboristaj verkistoj. Jam en la jaro 1955, sub kulturado de siaj gvidantoj, Hu Vanĉun fariĝis laboristokamparana korespondanto de iu ĵurnalo. Li mem rakontis: "Mia unua kontribuajo estis farita per buŝo, helpate de la ĵurnalista, kiu por mi skribis. Post aperigo de la skribajo mia majstro diris al mi: 'Ha, Huĉjo, vi fariĝis *Hiucaj*!'" Poste mi pensis ke mi ne povos verki nur buŝe, tial mi komencis skribi mem per la plumo." Sed granda estas la malfacilo por li en verkado pluma. En la malnova socio li neniam vizitis lernejon. La ideografiajn malmultajn li ellernis mem kun penoj. Komentante literaturan kreadon, tre multe da manuskriptoj li skribis kaj sendis al redakcioj de ĵurnaloj, sed same multe oni al li resendis pro ilia netaŭgeco. Ĉiutage li skribis kaj elsendis sian

kontribuaĵon, kaj ĉiutage li ricevis la resenditan, sume 200 pecojn. Tamen li ne perdis sian kuraĝon, sed male, pli streĉe lernadis. En la jaro 1952, lia skizo "Riparo de laminatilo" aperis en la felietono de Ŝanhaja "Venhuj-tagjurnalo". Ĝi temas ĉefe pri veraj homoj kaj okazaĵoj. Ĝia aperigo donis al li grandan kuraĝon kaj fariĝis turnopunkto de lia literatura verkado. El la penega laborado super siaj verkoj li konsciis, ke verki estas ne mistere. De tiam li ofte aĉetis librojn. La unua kiun li legis, estas "Infanaĝo" de Gorkij. Leginte ĝin li tre emociĝis kaj rememoris siajn suferojn travivitajn dum infanaj jaroj kaj el tiu libro li ricevis bonan ins-

piron: Gorkij povis priskribi sian vivon infanjaran, kial mi ne povas skribi la mian? Tial li decidis lerni verki kaj seninterrompe verkis. Post kelkaj jaroj li fariĝis laborista verkisto kaj profesie okupiĝas pri aktiveco de literatura kreado.

Streĉa studemo kaj malceda persisteco de laboristoj en produktado ankaŭ tre klare montrigis en ilia verkado. Kiam Hu Vanĉun skribis la novelon "June-co", komence de ĝia komponado ĝis teksto-definitivigo, li daŭrigis la skribadon dum 6 monatoj kaj ĝin reviziis 5 fojojn. Ankaŭ Fej Liven kaj Tang Kehin penegas en sia verkado. Antaŭe Fej estis tornisto de Ŝanhaja Dizela Fa-

briko kaj havis klarecon samnivele kiel tiu de elementa lernanto. Li debutis en verkado antaŭ 1953, kiam li publikadis simplajn kaj mallongajn korespondaĵojn en la "Labora ĵurnalo" en Ŝanhajo. En 1954, kiam lia fabriko ekdisvolvis la movadon de teknika renovigo li skribis kelkajn novelojn, sed ĉar en ili teknikaj problemoj okupas grandan spacon, ili estas malfacile kompreneblaj por tiuj kiuj ne konas tiajn teknikojn. Fej Liven tre ĉagreniĝis kaj eĉ ne volis daŭrigi sian skribadon de noveloj. Sed post kelkatempa lernado, fine li trovis siajn mankojn en verkado, kaj ankaŭ rimedojn por ilin forigi. Lia novelo "Du tekni-

Fej Liven:

Printempo jam venas...

JINŜENG ĉiam opinias, ke kunesti kun fraŭlinoj ege ĝenas. Sed estu klarigite, ke tiun ĉi opinion lian ne kaŭzis la feŭdalisma ideologio, sed nur ĉar li estas turmentita de la buŝaj "ĉirkaŭatakoj" de la knabinoj.

Hodiaŭ ili pasigas la "Ligan Tagon" en la parko. Ordinare oni povus kontentige sin amuzi, sed nun, ĵus kiam komenciĝis libera sinokupado, li estas ree ĉirkaŭita de aro da novaj metilernantinoj, kiuj persiste devigas lin ion rakonti. Ha, ĉu ne estas klare ke ili per tio intencas matigi lin? Ĉio kion li povas elpensi por kombini rakontojn estas jam tute elpremita en vesperkunvenoj. De kie li ankoraŭ povas trovi ion por rakonti!

Sed tia estas la afero: ĵu pli li estas embarasita, ne povante malfermi la buŝon, des pli brue pepkrias la knabinoj. Precipe Guĵlan, kiu ĵus alvenis por partopreni en la bruado, kiu ŝin altiris, saltadas kvazaŭ pigo, tien ĉi tien en la amaso, kaj elpensadas malicaĵojn apogante sin sur sia veteraneco kiel samlaborgrupano de Jinŝeng. Kompreneble Jinŝeng ofte plendis ke ŝi estas tia homo, kiu havas brakojn eksteren turniĝantajn kaj pugnojn internen batantajn.

Nun, oni ne scias kiel, en daŭro de palpebrumo ŝi tire kaj puŝe alŝovis Hiuĝen en la grupon kaj diris petole: "Kiel sekretario de la Liga ĉelo, vi devas

esti senpartia. Diru, ĉu tiu nia elstara persono ne devas ion rakonti, nu?" Parolante ŝi intence fiksigardis al Jinŝeng, kvazaŭ ŝi ne konus lin.

En la komenco Hiuĝen estis tute konfuzita de la neatenditaĵo. Kiam ĉio fariĝis klara al ŝi, ŝi turnas sin por foriri, dirante: "Tio estas afero libervola. Ĉia devigo aŭ ordono ne utilas."

Jinŝeng komprenas, ke per tio ŝi evidente helpas lin elturniĝi. Kiam li estis ĝuste parolonta, li rimarkis ke Hiuĝen estas ĉirkaŭprenata de kelkaj junulinoj, kaj retenis siajn vortojn.

Tio estas efektive: blovo al ŝipkapo faras grandan turniĝon — ĉiuj ekdirektis sin al Hiuĝen. Guĵlan grumblante ĵetas minacantan rigardon al Jinŝeng, kvazaŭ dirante: "Se vi ne submetiĝos, mi bone regalos ŝin."

Hiuĝen baraktas ĉiuflanken por sin liberigi, sed vane. Kiam ŝi turnis sian vizaĝon, Jinŝeng rimarkis, ke ŝiaj vangoj estas ruĝiĝintaj kaj ŝia ridanta vizaĝo signalas help-peton. Li estas tiel maltrankvila ke lia tuta korpo ŝvitas. Li volas alkuri por helpi Hiuĝen, sed la ĉirkaŭaj junulinoj strikte lin gardas kaj li nur vane sopiras ŝin helpi. Tamen li ankoraŭ cerbumas por elpensi ian rimedon por liberigi ŝin.

Estas prave dirite ke kie estas volo, tie estas vojo. Ekvenis ideo en la kapon de Jinŝeng. Tuj

kistoj”, publikita en Ŝanhaja “Liberiga ĵurnalo” en la 1-a de majo, 1955, pruvis, ke li jam transiris en novan etapon de sia verkado. Iuj tiel recenzis: Lia novelo “Du teknikistoj” estas matura verko laŭ priskribo de personoj, traktado de rakontdetaloj, aŭ tekniko de arta esprimado. La 22-an de septembro de la sama jaro en felietono de “Liberiga ĵurnalo” publikiĝis lia dua novelo “Unu Jaro”.

Mi memoras, ke iu fremda laborista verkisto diris: “Kiam laboristoj ekprenas plumon por verkado, la unua temo, kiun ili priskribas, estas pri laboro kaj proleto”. Tiel ja montras la

faktoj. En siaj verkoj, niaj laboristaj verkistoj plejparte skribis pri la laborista klaso kaj socialisma konstruado. Oni eĉ povas tiel diri, ke ju pli rapide disvolviĝas la socialisma konstruado, des pli multe kaj bone ili skribis. Dum impetego en produktado de industrio kaj agrikulturo en 1958 ankaŭ Hu Vanĉun plej riĉe rikoltis en sia verkado. Lia kolekto de skizoj “Kiu estas la kreantoj de mirakloj” kun 180,000 vortoj estis skribita en tiu jaro. En la antaŭparolo de tiu kolekto li skribis: “Devene mi estas laminatisto, kaj vidas en mia fabriko multe da novaj homoj kaj novaj aferoj, kiujn speguli mi havas ja devon. Se mi ne

priskribas ilin, mi do sentas min multŝulda al miaj samklasaj fratoj.” Ankaŭ Fej Liven en sia antaŭparolo de la skizaro “La konkurso ne finita” skribis: “Mi sentas grandan feliĉon vivi en tia epoko, kia estas la nia. Nekalkuleble multaj heroajoj min instruas, mondskuaj mirakloj min impresas. Pro tio mi ne povas endormiĝi, kaj ege deziras posedi gigantan povon ilin skribi kaj konigi al pli multe da legantoj.”

** Hiucaj — titolo donita al tiuj, kiuj sukcesas la unuan regnan ekzamenon en la iama feŭdisma Ĉinio.*

li kriis: “Kies afero ĝi estas, tiu al ĝi respondecas! Jen mi rakontos.”

“Vidu, kiel efikas mia manovro!” Kun la triumfa rido de Gujlan, la sieĝo al Hiuĝen estis tamen disigita.

Sin apogante sur la ŝultro de Gujlan, Hiuĝen iom anhelis kun la mano sur sia brusto. Ĵetinte rigardon al ŝi, Jinseng ankaŭ sentis sian bruston ondanta. Sub la gardo de Gujlan li pene kombinis jenan rakonton.

“Estis juna tornisto nomata Malgranda Ma. Dum du sinsekvaj jaroj li estis modela laboristo en la urbo. Proksimiĝis denove la jarfino. Kvankam li diris nenion, li estis senlime ĝoja en la koro, ĉar dum la kuranta jaro li ree sukcesis brile en ĉiuj rilatoj, antaŭirante la aliajn laboristojn.

“Tun tagon, al li estis asignita nova tasko, kiu tamen estis iom malfacila. Ju pli Malgranda Ma volis rapidi, des malpli glate iradis la laboro, kun oftaj fuŝetoj tie ĉitie. Malgranda Ma ege ŝvitis pro malpacienco. ‘Kia domaĝo!’ Li pensis. ‘Se la laboro daŭrus tiamaniere, kiel mi povus plenumi la planon!’ Konfuziĝo de la pensado sekvigis konfuziĝon de la manoj. ‘Pat!’ Jen ĉe ekstreĉo rompiĝis borilo tiel granda.

“Tio plene konsternis Malgrandan Ma-n. Li haltigis la tornilon kaj demetis la rompitan borilon per tremantaj manoj kun doloro en la koro kaj konfuzeco en la kapo. Jen li rememoris pri la Tutlanda Kongreso de la Pioniraj Produktantoj en Pekino, en kiu li estis aplaŭde akklamata de miloj da homoj; jen li kvazaŭ vidis kelkajn nekonatojn moki malantaŭ

li: ‘Jen, vi fiaskos ĉifoje!’ Finfine, kiam li reregis sin kaj rigardis ĉirkaŭen, li trovis ke la maŝinoj zumas kiel kutime, la elektraj transportiloj kun produktaĵoj de diversaj grandecoj cirkulas tien kaj reen en la aero, kaj la kolegoj sin klinas ankoraŭ tiel absorbite super siaj maŝinoj kaj neniu rigardas lin, des pli neniu rimarkis kio okazis ĉi tie. Malgranda Ma ekspiris malstreĉite. Kaj kiam turninte la kapon li rigardis la broditajn flagojn, diplomojn, kaj la respondojn al defioj skribitajn sur koloraj paperoj, kiuj pendis plene sur la muro, lia vizaĝo tuj ekflamiĝis. Plurfoje li prenis kaj remetis la borilon, sed fine kun kunpremitaj dentoj li rapide enmetis ĝin en la instrumentujon, murmuretante: ‘Neniu sciu pri tio. Mi devas trovi ian rimedon.’ Sed antaŭ ol li estis ferminta la kovrilon de la instrumentujo, li eksentis frostremon kaj stultiĝis dum longa tempo. Kvankam li fine fermis la kovrilon, tamen koro batadis furioze.

“Post iom da tempo li alvenis per ĉirkaŭiro al la fenestro de la oficejo de la labor-estro, tra kiu li enrigardis. Tie sidis junulino kun vizaĝo de melonsema formo dorse kontraŭ la fenestro. Ŝi portis kafo-koloran desegnohavan silkan vatitan veston kun ruĝa lana skarpo ĉirkaŭ la kolo. La du harplektaĵoj krucite volvitaj malantaŭ la kapo donis al ŝi aspekton prudentan kaj belan. Ŝi estis neniu alia ol Ĝoŭ Hua, la labor-estro, kiu estis ĝuste kontrolanta produktojn kaj subskribanta laborordonojn. Malgranda Ma levis sian manon kelkajn fojojn antaŭ ol li frapetis ĉe la fenestro.

“‘O, estas vi, Malgranda Ma! Kiel mirinde, ke vi denove superplenumis la produktan celciferon 1.5-oble!’ ekridetis Ĝoŭ Hua, sur kies vangoj tuj vidiĝis

du ĉarmaj kavetoj. Renkonte ŝi venis al la fenestro kun plano en la mano.

“Ne parolu pri tio! Lasu min diri al vi.” Malgranda Ma ŝovis la kapon en la fenestron kaj flustris al ŝi en la orelon ĉion kio ĵus okazis.

“Aŭdinte tion, ankaŭ Ĝoŭ Hua estis surprizita: ‘Do vi tute fiaskis koncerne vian normon de la uzado de laboriloj, ĉu ne?’

“Jes,” apatie respondis kapjesante Malgranda Ma. ‘Ĝuste pro tio mi ja venas al vi.’ Rigardinte ĉirkaŭen kaj klininte la kapon kun vizaĝo ruĝiĝinta ĝis la kolo li diris al ŝi post paŭzo: ‘Ĉu estus bone, ke vi petu iun aĉeti novan borilon por anstataŭi la rompitan. Tiel, ĉio jam estos en ordo, ĉu ne?’

“‘Anstataŭi per iu nova?’ hezitis Ĝoŭ Hua. Vidante la maltrankvilegan vizaĝon de Malgranda Ma, ŝi sentis ankaŭ kvazaŭ ŝtono pezus en ŝia koro. Kia domaĝa afero! En la lastaj tagoj ŝi ĝuste resumis laŭ la peto de la supera partikomitato la novajn atingojn de Malgranda Ma en la kuranta jaro, por ke ili estu baldaŭ disvastigataj tra la tuta lando. Sed precize en tiu grava momento okazis tia ĝena afero. Kion fari? Li estas la standardo rekonata de ĉiuj, lin edukis ĉiumaniere la Partio kaj la gvidantoj. Ĉu ni lasu lin fiaski simple pro la rompiĝo de unu borilo?

“‘Kiel vi pensas?’ urĝe demandis Malgranda Ma, kiam li vidis ke ŝi restas silenta.

“‘Ah!’ krietis Ĝoŭ Hua. Ŝi viŝis distrite al li la ŝviton de lia frunto per poŝtuko kaj respondis kun longa elspiro: ‘Nu, tiel estu!’

“Kiam Malgranda Ma jam foriris sufiĉe malproksimen, Ĝoŭ Hua malrapide revenis al sia seĝo. Estis strange ke tiu ĉiam trankvila kaj firma junulino, subite fariĝis malkvieta. De tempo al tempo ŝi stariĝis kaj ree eksidis; jen tuŝis ĉi tion, jen palpis alion. Ŝi sentis, ke en la ĉambro subite fariĝis premvarmege. Sed kiam ĉiuj fenestroj estis malfermitaj, ŝi ankoraŭ sentis sufokecon, kaj plie, ŝia cerbo estis ankoraŭ konfuzita. Post momento, kun eksvingo de mano, ŝi decidis murmurante al si. ‘Li ja tiel konfidis al mi, malkaŝante antaŭ mi ĉion, . . . petu finfine iun aĉeti por li! Tio alportos al la ŝtato nenian perdon, kaj li ankaŭ. . . . Kaj aranĝinte sian laboron ŝi eliris el la sekcio de laboriloj. Sed post nur kelkaj paŝoj, ŝi ekhaltis kaj demandis: ‘Ĉu vi agas prave, Ĝoŭ Hua? . . . Ĉu per tio vi ne subtenas lian falsigon? Ĉu la gvidantoj intencas eduki *pionirajn standardojn* en tia maniero? Ne! Tiel agi absolute ne devas!’ Sed kiam revenante antaŭ la honortabulo, ŝi vidis sur ĝi la pligrandigitan portreton de Malgranda Ma, en ŝia kapo eksvarmis konfuzaj pensoj. Ŝi rigardis al lia kvadrata vizaĝo, al liaj okuloj, kiuj kvazaŭ ĉiam ridetas al ŝi, kaj ekklinis sian kapon, pensante: ‘Sed, ĉu Malgranda Ma ne riproĉos min pro tio ke mi estas tro senkora al li?’

“‘Ne, ĝuste ĉar li estas mia amiko, mi devas des pli gardi, ke makulo ne aperu sur li Li komprenos min fine.’ Ĝoŭ Hua forte mordis sian lipon, decide piedfrapis kaj kuris en la oficejon de la Partia sekretario.

“Nun ni turnu nin al Malgranda Ma. Kiam li revenis al sia tornilo, lia koro estis en granda maltrankvilo, kvazaŭ ŝipeto balanciĝanta en uragano. Li volis turni sian rigardon al la aliaj, sed timis ke eble ili ekrimarkos lian sekreton. Malpacience li atendis la alvenon de Ĝoŭ Hua, sed timis ke eble ŝi ne povas solvi la problemon. Jen li volis sin riproĉi, ĉu li faris eraron, jen li sin konsolis per imago de felica fino. Tiel, li ne rimarkis eĉ kiam Ĝoŭ Hua jam staris apud li.

“‘Malgranda Ma!’

“‘Ah!’ Malgranda Ma ekhaltigis la tornilon kaj urĝeme demandis kaptante ŝian manon: ‘Kiel? Ĉu ĉio estas finaranĝita?’ Ĝoŭ Hua nur kapjesis senvorte. Spiron nun retrovis Malgranda Ma por forviŝi la ŝviton de la vizaĝo per mano.

“‘Mi ĵus iris al la Partia sekretario kaj raportis la aferon al li. . . .’



Fratinoj Lernas en Konkur' *sen Laco*

— Popolkanto el Giangsu-provinco —

Ilustris Migu

*Antaŭe je vizito al patrino,
babiloj viglis nur pri kok', anaso;
nun vizitante al patrino domo,
fratinoj lernas en konkur' sen laco.
Nek unu nek alia poste restas,
patrin' maljuna ege ĝoja estas.*

Trad. Laŭlum

“Kio?” Supozante, ke misaŭdis liaj oreloj, Malgranda Ma rigardis al Ĝoŭ Hua, per rondigitaj okuloj.

“Turninte la vizaĝon malsupren, Ĝoŭ Hua diris en tremanta voĉo: ‘Eraro estas malfacile evitebla por ĉiu ajn. Nur se oni povas trovi ĝian kaŭzon kaj ne plu ripeti, ĉu per tio oni ne jam progresas je unu paŝo? . . . Kontraŭe, se oni volas kaŝi sian eraron, ĉu tio ne estas jam plia eraro? . . . Ne forgesu, ke vi estas modelo por ĉiuj!’

“Kvazaŭ kuvo da malvarma akvo la vortoj de Ĝoŭ Hua abrupte duŝiĝis sur lian kapon, ke li ek-tremis de frostosento. Li volis ion diri, sed sukcesis elbuŝi nenion. Li jetis rigardon al ŝiaj severaj okuloj kaj sentis ke ili ne estas nur de unu persono, sed de sennombraj personoj, riproĉe direktitaj al li. Li rigardetis al la broditaj flagoj sur la muro kaj sentis ke la ruĝaj silkajoj jam transformiĝis en sennombrajn fajromasojn, sin jetantajn kontraŭ li. Paliĝis lia vizaĝo, bluaaj vejnoj ŝveliĝis sur lia kolo. Li rapidis kelkajn paŝojn, sin apogis sur muron kaj ekbatis sian klinitan kapon per la pugno.


“Rigardante la dorson de Malgranda Ma, la vizaĝo de Ĝoŭ Hua ankaŭ paliĝis. Kelkfoje ŝi volis iri al li, sed ŝiaj piedoj ne moviĝis malgraŭ kelkaj provoj, kaj nur kun kunpremitaj pugnoj ŝi sin turnis flanken por viŝi al si la okulojn per poŝtuko, rapide kaj kaŝe ne lasante Malgrandan Ma-n ĝin rimarki.

“Ĝuste tiam la fame babilema maljunulo respondecas pri laboriloj alkuris kriante jam de malproksime: ‘Hej, Malgranda Ma, pri kio vi cerbumis ke vi lasis la borilon rompiĝi? . . .’

“‘Ah, ankaŭ vi jam scias tion.’ Malgranda Ma abrupte turniĝis. Io flamanta leviĝis de lia brusto al lia vizaĝo. Li fikse rigardis en la okulojn de Ĝoŭ Hua, kun nenomebla kolero ŝtopanta la koron. Li pensis: ‘Vi iras tro malproksimen, Ĝoŭ Hua! Vi kritikis. Nu, bone. Mi ne malakceptas. Sed pro kio trumpetas tra la tuta urbo, lasante al mi nenian retroirejon? Vi . . . vi estas ankoraŭ mia bona amikino!’ Ekkonvulsiis lia korpo. Lia vizaĝo rigidiĝis kvazaŭ viola melongeno post prujno. Indigne li pensis: ‘Nu, ĉiuj min riproĉu! Fine, kian plezuron vi ricevos el tio?’

“La maljunulo babilema tute ne atentis pri la ŝanĝita mieno de Malgranda Ma kaj daŭrigis sian babiladon: ‘Efektive, labormodelo estas finfine labor-modelo. Ĉe difektiĝo de laborilo, li tuj raportis tion al la labor-estro. Kiel bone! Laŭ sciigo de la laborestro, nu, tuj estas farata la formularo, kaj ĉio estas jam bone aranĝita. Sed sin trovas ankaŭ tiaj homoj, kiuj malrapidas raportoj pri la difektiĝo de laboriloj, kvazaŭ ili povus kaŝi la okazintaĵon por ĉiam . . . Ili bone lernu de vi.’ Tion dirante, li transdonis al Malgranda Ma difektoraportilon.

“‘Ah, kio estas ĉio ĉi tio?’ stultiĝis Malgranda Ma kun cerbo en granda konfuzo. Nur post longa



Kante L' Ruĝan Sunon Vekas

— Popolkanto el Ŝandong-provinco —

Ilustris Vang Ŝuhj

*Knabineto kun harligoj longaj,
en komplet' da vestoj buntaj,
ĉiumatene urin-sterkon portas,
kante l' ruĝan sunon vekas.*

Trad. Laŭlum

tempo li ekkomprenis ke kiam Ĝoŭ Hua severe lin kritikis, ŝi jam faris bonan aranĝon samtempe por lia eraro. Tiam li redirektis sian rigardon al ŝia vizaĝo, kiu, li ne sciis kial, ŝajnis en la sama momento pli ronda ol antaŭe. Kaj la paro de nigraj okuloj aspektis pli brilaj. Sur ŝia serioza vizaĝo li jam rimarkis kaŝitan rideton ĉe la buŝanguloj kaj elradiantan mildan senton. Kiam li etendis la manon por preni la difekto-raportilon, al li ŝajnis, ke anstataŭ paperfolio ĝi estas ŝtono peza je kelkaj ĝinoj en lia mano. Ĉu pro honto aŭ pro aliaj kaŭzoj, li longe restis embarasita kun klinita kapo kaj tremantaj manoj kaj ne sciis kion fari.

“‘Ne okupadu lian tempon! Subskribu vian nomon kaj transdonu al li la rompitan borilon. Kaj ĉio estas finita.’ Milde flustris Ĝoŭ Hua.

sian nomon per neobeema mano kaj elprenis la rompitan borilon el la instrumentujo, la maljunulo transprenis ĝin kapjesante kaj grumblante foriris.

“Dum momento staris stulte Malgranda Ma. Rigardinte unue al siaj manoj kaj poste al Ĝoŭ Hua, li eksvingis la manojn kaj rapidis al sia tornilo. En tiu palpebruma daŭro Ĝoŭ Hua rimarkis ĉe la okulanguloj de Malgranda Ma ekbrilon de larmoj.

“La tornilo eligis zumon kaj rapidege turniĝis la akso. La violblua ferrubo svingiĝis jen kvazaŭ flirtanta rubando laŭ la movo de la prilaborajo, jen disflugis kelkajn futojn alten kiel pluvgutoj kaj falis flagrante ĉirkaŭ la maŝino Malgranda Ma firme tenis la tenilon per ambaŭ manoj, fikse rigardante la nove alfiksitan borilon. Kiam estis atingota la fiksita grandeco, subite ekkrakis la prilaborajo kaj peco de ferrubo falis sur lian maldekstran brakon. . . . Kun ekkrio Ĝoŭ Hua alkuris al li kaj kaptis lian brakon. Sed Malgranda Ma nur movetis sian korpon, kaj ne retiris sian brakon, ĝis ĉiuj laboriloj kiel borilo, tranĉilo kaj aliaj estis tute retiritaj. Nur tiam li ekkovris la vunditan lokon per la alia mano kun kunŝovitaj brovoj.

“‘Kiel? Vi brulvundiĝis, ĉu ne?’ demanidis Ĝoŭ Hua palpante por pririgardi la vunditan lokon.

“‘Estas nenio,’ respondis Malgranda Ma tre mallaŭte.

“‘Vi ankoraŭ diras: nenio. Rigardu, ruĝiĝis jam granda peco de la haŭto. Rapidu ŝmiri ĝin per unĝvento.’ Ĝoŭ Hua perforte tiris lin al la kuracstacio. Tie malpeze ŝmirante lian brakon per unĝvento ŝi flustris al li: ‘Kio? Iom da amarajo kaj vi ankoraŭ ne povas elturniĝi el via penslabirinto? Se oni faris eraron, oni devas tion konfesi. Ĉu mi ne montris al vi tiun vian mankon kiam mi rekomendis vin aliĝi al la Ligo? Vi volas ke la malnova cikatro ankoraŭ restu?’

“‘Jen, kion vi pensas! Ĉu mi ne jam delonge konfesis mian eraron? Ruĝiĝis Malgranda Ma ĝis la kolo.

“‘Se vi vere konfesis vian eraron, ĉu vi ankoraŭ povas esti tiel rigidkapa ke vi vundiĝis kiel tia? . . . Nu, ĉu ankoraŭ doloras?’ Ĝoŭ Hua blovetis sur lian brakon por mildigi la doloron.

“‘. . . Tio estas pro ke la maŝino turniĝas tre rapide kaj la prilaborajo estas sufiĉe malgranda. Se mi ne rapide retirus la tranĉilon, la borilo rompiĝus denove.’

“‘Ha! . . . Tio des pli klare pruvas, ke la malnova nodo en via penso ne estas disigita. Kiam eraro okazis, kial anstataŭ eltrovi ĝian kaŭzon vi pensis nur kiel ĝi al vi efikos. Diru, pro kio estas tio!’ Ĝoŭ Hua volis ankoraŭ daŭrigi, sed ŝin interrompis iu laboristo, kiu venis peti taskon. . . .



Unu Korbo

— Popolkanto el Hebej-provinco —

Ilustris Li Kjun

Ĉi tiun korbon iam uzis la avino
dum almozpeto manteneante paĉjon.
Ĉi tiun korbon iam uzis mia panjo
dum legomserĉo* en malsata jaro.
Ĉi tiun korbon iam uzis la bofranjo
por sendi orajn vovo-jn** al la kampo.
Ĉi tiun korbon portas nun mi mem por preni
spicitaĵajn panojn el komun-manĝejo.
Senlime bona — la popola komunumo,
ĉiele vasta — la Partia amo.

* legomserĉo — kolektado de sovaĝaj legomoj
t. e. manĝeblaj herboj.

** vovo — konusforma vaporumita manĝaĵo el
maiza aŭ milia faruno.

Trad. Laŭlum

“‘Pravas fraŭlino Malgranda Ĝoŭ. Mi, maljuna intendanto, ja ne estas senfaranto. . . . Nu, subskribu ĉi tie, jes.’ la maljunulo montris al li la lokon. ‘Por vi tio estas ankoraŭ la unua fojo. Hej, simple ĉe ekvido de tia raportilo, tuj min atakas kordoloro. Mi petas vin gardi bone en la estonteco, uzi pli vian cerbon kaj ne manipuli senpripense kun fermitaj okuloj.’ Kiam Malgranda Ma subskribis konfuze

“Vespere, eklumis la lampoj ĉirkaŭ la fabriko, la ĉirkaŭaĵo estis tiel beligita, kvazaŭ ĝi estus ĵus malfermita trezorejo. La maŝinoj estis ankoraŭ tondrantaj. La fajrolumo el la altforno ruĝigis duonon de la ĉielo. Kvazaŭ konsciante sian senpovecon rivali kun la grandioza sceno, la nokto fariĝis malklara kaj vualigis per nebulo, kaj sur la pala ĉielo frostitaj steloj des pli ne povis elsendi brilon. Malgranda Ma sidis antaŭ la fenestro, kun la brakoj krucitaj sur la brusto. Li fikse rigardis ekster la fenestron kun iom levita kapo. Fakte li nenion rigardis nek aŭskultis, sed nur meditis absorbite pri tio okazinta en la tago. Ju pli li meditis, des pli li konvinkiĝis, ke pravas la vortoj de Ĝoŭ Hua, kaj des pli pentis ke li elpensis tiun ideaĉon. Finfine li ekfrapis pugne la tablon, dirante: ‘Nu ĉesu kroĉiĝi al tiu forpasintaĵo. Se vi elpensos rimedon kontraŭ rompiĝo de borilo, ĉu ĝi ne jam estos praktika ago?’ Li tuj demetis sian superveston, supren volvis la manikojn, kaj jen ĉirkaŭiris en la ĉambro, jen sidiĝis antaŭ la skribotablo, desegnante groteskajn skemojn. Tiel daŭris kelkaj horoj ĝis fine la skemo iagrade pretiĝis. Tiam kaptinte ĝin en la mano, li kuris saltante al la dormejo de la laboristinoj, malgraŭ ke estis jam meznokto.

“Sed kiam estis malfermita la pordo, li trovis ke Ĝoŭ Hua ne troviĝas tie. La samĉambraninoj informis lin ke ŝi iris al la laborejo. ‘Kial ŝi restas tie en tiel malfrua horo?’ Kun miro li rapidis al la laborejo. Sed li ne trovis ŝin en ŝia oficĉambro. Fine li trovis ŝin ekster atendo antaŭ lia tornilo.

“Malgranda Ma volis tuj kuri al ŝi kaj laŭte sciigi ŝin pri la skemo kiun li ĵus faris. Sed kiam li ekvidis ke skemo ankaŭ estas sternita antaŭ ŝi kaj maŝinpecojn en ŝiaj manoj. Li stultiĝis surprizite. Li ekkomprenis, ke Ĝoŭ Hua ankaŭ planis por li aŭtomatan haltigilon. Li rapide kaŭriĝis, ek-kaptis la plene olemakulitajn manojn de Ĝoŭ Hua, rigardis kaj rerigardis al ŝi senvorte. Li volis elverŝi ĉion el sia koro, sed ne sciis de kie li komencu. Post longa momento li balbutis mallaŭte: ‘Vi estas vere mia bona . . . amikino. . .’

“Tiuonokte, oni trovis ilin longe restantaj en la oficĉambro, kun la du skemoj metitaj unu apud la alia. Sub la lamplumo ili jen foliumis ĉi tie, jen serĉis tie ĝis tre malfrue. Je la tria tago la aŭtomato estis efektive elprovita. En la jarfina premikunveno, la laboristoj ankoraŭ elektis Malgrandan Ma-n kiel labormodelon, ĉar li solvis multajn gravajn problemojn en produktado de la fabriko kaj ankaŭ pro tio ke li povis ekkoni sian eraron.”

* * *

Ĵus kiam Jinseng finis la rakonton, Gujlan saltleviĝis kaj kriis gestegante: “Novaj kamaradinoj, ĉu vi scias, ke hundo pelata muron transsaltas — li rakontis ĵus veran okazintaĵon?”

“Ho!” la metilernantinoj ekbruegis. “Ĉu efektive? Kie estas la geherooj do?”

“Ne plu donu signon per okuloj kaj brovoj, Jinseng! Lasu min malkovri la sekreton. La heroo estas li mem kaj la heroino . . . ho ve, ŝi jam forkuras!” Kun la krio de Gujlan, ĉiuj turnis la kapon kaj vidis ke Hiuĝen kuras per grandaj paŝoj rekte en la direkto al la arbaro. Tion vidinte, la knabinoj ĉiuj returniĝis por kapti Jinseng, sed ankaŭ li jam forkuris dume. La junulinoj ridegante provis postkuri lin, sed malsukcesis kaj lasis ilin for.

Apud kvieta rivereto Jinseng fine trovis Hiuĝen. Eble lacigita pro kurego, ŝi sin apogis sur balustrado, kun unu harplektaĵo pendanta antaŭ la brusto kaj la alia sur la dorso. Ŝia vizaĝo estis tiel ruĝa kiel plene florantaj ruĝaj prunfloroj kaj ŝia brusto ondadis senĉese. Blanka skarpo pendas oblikve sur ŝiaj ŝultroj. Ŝia nigreblua lana jupo senĉese flirtis en la vento. Forviŝante la ŝviton, ŝi ankoraŭ atente rigardis ĉirkaŭen. Kiam ŝi ekvidis Jinseng, ŝi mem ne sciis kiel lin trakti, ĉu riproĉi aŭ pardoni? ĉu disiĝi de li aŭ resti kun li por kontraŭstari la persekutantojn? Sed kiam Jinseng alproksimiĝis kaj mallaŭte alparolis ŝin, ŝi subite forlasis kion ŝi ĵus pensis, kaj diris per kvazaŭ riproĉa voĉo: “kian bonajon vi faris! Kiu petis vin eldiri la aferon?”

“Ja ili elpremis de mi!” respondis Jinseng kun rideto. “Cetere, tio estis via merito. Kiel mi povas atribui ĉion al mi sola?”

“Lasu, lasu!” Versajne Hiuĝen ne trovis vorton por lin refuti, sed, fine, ŝi tamen aldonis: “Lasu la pasintaĵon. Sed de nun vi bone notu, ke vi devas neniam plu rakonti pri tiu ĉi afero. . . .”

Burĝonas la abrikotarboj kaj kreskas la folioj de la salikoj. La tero fariĝas verda kaj la riverakvo klara. Rigardu! En la rivero speguliĝas la bildo de du personoj. Sur branĉo, paro de nekonataj birdetoj kun turnitaj kapoj kaj disetenditaj flugiloj, estas kantantaj al la rivero, he, tute senfine!

La printempo jam venas. . . .

Trad. Pandiŝo



Kiam la Ĉielo Falis

Popola satira rakonto (*Kolektis Ĝang Ŝigie*)

IAM estis homo, kiu ne laboris sed kuŝis sur lito pensante: “Kiom bone estus, se la ĉielo falus! Kaj tiam pereu ĉio en la mondo, krom mi kaj unu junulino. Ni geedziĝus kaj vivus dolĉan vivon. Ho! Kiel bona tio estus!”

Neatendite ĝuste tiam ekaŭdiĝis bruego, kaj kun la bruego falis efektive la ĉielo, kaj pereis efektive ĉio krom li kaj unu junulino. Li freneze ĝojegis. Sed neatendite la junulino ĉirkaŭrigardis kaj ekploris plendante al li:

“Ho ve! jen via ‘bela ideo’! Restas nun ni du solaj en la mondo. Nur malsato sufiĉos fini niajn vivojn, jam ne menciu la ceterajn.”

“Prave!” pensis li tion aŭdinte, “Estus bone, se estus ankaŭ unu kuiristo.” Jen aperis efektive unu kuiristo, tuj post lia ekpenso. Ree li ĝojegis, sed la kuiristo tuj ekgrumblis ĉirkaŭrigardinte:

“Troviĝas nek rizo rafinita nek faruno, nek oleo nek salo, nek brulajo nek kuiriloj. — Ĉio ĉi tio mankas. Kiel mi povus kuiri manĝaĵojn!”

“Prave!” ree pensis li tion aŭdinte, “Kiel bone estus, se troviĝu ankoraŭ po unu homo por produkti rizon, farunon, oleon, salon, brulajon kaj kuirilojn!” Apenaŭ li finpensis, aperis tuj efektive tiuj ĉi homoj. Ree li ĝojegis, sed tute neatendite tiuj ĉi homoj diris al li malgaje ĉirkaŭrigardinte:

“Ve! Estas nek rizo nek pistilo. . .”

“Ve! Kaj nek azeno nek muelilo. . .”


“Ve! Ambaŭ sezamo kaj olefariloj mankas. . .”

“Ve! Kie estas la bezonaatj marakvo kaj sunlumo? . . .”

“Ve! Ne troviĝas montoj nek arboj. . .”

“Ve! Ambaŭ feron kaj fajron mi ne havas. . .”

“Ho ve! Mia ĉielo!” tuj ekkriis li manpremite la kapon, “Ĉio ĉi tio troviĝus, nur se la ĉielo ne falus. Sed kion faru mi nun, kiam falis jam la ĉielo!” Ege perpleksita li ekŝvitis tutkorpe kaj ekmalfermis la okulojn. — Ho, la ĉielo ja ne falis. Ĉio okazis nur en la sonĝo.



Gaje Ĉirpas Hirundoj Tondil-vostaj

— Popolkanto el Ŝandong-provinco —

Ilustris Ŝia Tongguang

Gaje ĉirpas hirundoj tondil-vostaj,
jam alvenas printemp' al montvilaĝo.
Ruĝajn jakojn surportas florburiĝonoj,
verdajn robojn surmetas la salikoj.
Ĉevalidoj, ŝafidoj kuras ĉie
sur la mont', paŝtisteto ŝalmon blovas.
Jen ari' "Oriente ruĝas suno",
jen ari' "Maljunuloj rejuniĝas".
Kamlabori komunumanoj iras
noktomeze, rezignas dormon kadroj.
Ĥoras kantoj tra l' tuta kampar-vasto,
ĉiuj pri la abunda grenrikolto.

Trad. Laŭlum

Ŝanhajo sub ŝtormo de renovigo kaj revolucio teknikaj


STORMO de teknika renovigo kaj teknika revolucio envolvas la grandan industrian urbon Ŝanhajo. En ĝi la Ŝanhaja laboristaro manifestis siajn senprecedencajn heroisman ambicion kaj komunisman stilon de kuraĝaj pensado, asertado kaj agado. En la homa konscio la komunisma pensmaniero prospere kreskas, rapide forbalaante, kvazaŭ ĉe disfendo de bambuo, la postrestintaĵojn de malnova ideologio kaj la influon de malnovaj kutimoj kaj renovigante ĉiutage la fizionomion de laborado kaj produktado.

La grandioza praktikado en la efektiviĝo de la Ĝenerala Linio dum la lastaj du jaroj konsciigis la vastan laboristaron pri sia propra forto. Ili fariĝis eĉ pli ambiciaj kaj pli aŭdacaj. Ili ne plu kontentiĝas pri la nuna nivelo de produkta tekniko kaj volas ŝanĝi ĝian fizionomion plej rapide, por levi ĝin al alta pinto. En la laboroj de fer- kaj ŝtal-produktado, muldado, prilaborado, muntado kaj pakado ĝis transportado, en- kaj de-ŝarĝado, kudrado, brodado, vestlavado, plandumado, manĝpreparado kaj legomtranĉado, kiujn oni plenumis de jarmiloj korpe aŭ mane, oni kun granda ĝojo klopodas efektiviĝi plenan aŭ duonan mekanikigon. Ĉiuj homoj—veteranaj laboristoj kaj meti-lernantoj, laboristoj kaj laboristinoj—memkonscie partoprenas la revolucion por forigo de peza korpo- kaj man-laboroj. En multaj fabrikoj pli ol 90 procentoj de la laboristoj sin jetas en la fluegon de la revolucio. La amaso nomas tiun ĉi revolucion la “Dua Liberiĝo” post la politika kaj ekonomia “suprenturnigo”. En la pasinteco la galvanizaj laboristoj de la ŝtata Ŝanhaja Bicikla Fabriko devis surmeti pezajn protektajn jupojn kaj kaŭĉukajn botojn, kaj mane porti prilaborajn pezantajn pli ol 10 kg. kaj marŝas 10 km. en la laborejo dum 8 horoj. Tre peza estis la laboro, kaj ankaŭ la labor-kondiĉoj ne estis tre bonaj. Nun ili kreis grandan kombinitan galvanizan aŭtomaton, kaj la situacio tute ŝanĝiĝis. La are kunkroĉitaj prilaborajoj estas aŭtomate levataj post galvaniziĝo el unu baseno kaj transportataj en alian. Por celebri sian “liberiĝon” unu el la galvanizaj laboristoj elfiksis ruĝan kvinpintan ŝtelon sur la aŭtomaton. Dum la unuaj dudek tagoj de

februaro ĉijare, la Ŝanhajaj transport-laboristoj realigis revolucion, starigis arbare en la ĉefaj fervojaj ŝarĝo-stacioj lev-aparatojn kaj vinĉojn, kaj cirkuligis ĉene ĉarojn. La fabrikaj transport-laboristoj forlasis, unuj post la aliaj, siajn portstangojn kaj ekuzis maŝinojn. La maljunaj transport-laboristoj en Jangpu-Fabriko por ŝpinteksado, Presado kaj Tinkturado ankaŭ montris sian heroisman ambicion spite al sia aĝo, ke ili lasas emeriti unue la portstangojn kaj mem laboras por socialismo ankoraŭ dek jarojn. La pakistinoj volis plialtigi siajn produktojn je obloj sen muskolvundo kaj vezikigo al siaj manoj. Helpe de laboristoj ili sukcesis fari pli ol dudek specojn da pakmaŝinoj por cigaredoj, bombonoj, dentpasta, alumetoj, kudriloj kaj aliaj produktoj de malpeza industrio. Tiel ili tute liberigis sin de manlaboro. Eĉ brodistinoj efektiviĝis la elektrigon de siaj brodmaŝinoj per propraj manoj.

Ĉiam pli da homoj strebas neŝanceleble al la alta montpinto de scienco kaj tekniko por atingi la progresintan nivelon de la mondo. Ili deklaris: “Ni devas havi ankaŭ tion, kion la aliaj jam havas, kaj mem krei tion, kion la aliaj ankoraŭ ne havas.” Post kuraĝa imago kaj malfacila studado, ili fine sukcesis elfari plej modernajn produktaĵojn, el kiuj certajn ili eĉ ne vidis antaŭe. Post 371 eksperimentoj Vang Linhe, laboristo de Huaguang Fabriko de Sciencaj Aparatoj, sukcesis konstrui altensian elektran ponton—la “okulon” por provi

La botelkovrilo-sigela aŭtomato prove fabrikita de la Kvara Medikamentfabriko de Ŝanhajo estas duoble pli multprodukta ol la duonaŭtomataj kovrilsigela maŝino. *Foto de Jang Botaŭ*



la kvalitojn de la izoligaj materialoj por alt-tensia elektrokurento. Nun en diversaj lokoj aperas grandnombre tiaj Vang-Linhe-oj. Antaŭ nelonge Ĉen Minggin, lignajisto de la Ĉina Fabriko de Aparatoj kaj Materialoj por Aŭtomata Telekomunikado kaj amatoro de radio, ankaŭ sukcesis fari plej modernan produktajn por radio, sub la gvido de la Partio kaj dank' al kolektiva helpo. Por tion atingi, la junulo kiu ricevis edukon nur de elementa lernejo legis dum unu jaro 120 librojn kaj gazetojn pri radio en lingvoj rusa, angla kaj japana.

Renovigo jam fariĝis bezono de la vivo kaj konscia, agrabla kaj krea laboro. Granda idealo naskas grandan agon. Se oni komprenas la deziregon de la amaso, rapide ŝanĝi la fizionomion de postrestinteco de la lando kaj surgrimpi la altan pinton por la gloro de la patrolando, oni facile komprenas kial ili tiel persiste strebas al sia celo forgesante eĉ manĝon kaj ripozon. Multaj laboristoj estas tiel absorbitaj en siaj klopodoj, ke ili dum manĝado uzas manĝ-bastonetojn por formi modelon, cerbumante puŝiĝas kontraŭ telegrafa stango kaj faras desegnojn eĉ en necesejo. Ili ĉie provas trovi inspiron por kreado. Ilian sagacon instigas tiaj bagateloj kaj ordinaraj fenomenoj de la vivo, kiaj ludado de infanoj sur svingilo, ekzerco de gimnastikistoj sur pendringoj, golfludo ĉe flanko de strato, pesado de legomoj en bazaro, la kaŭĉuka pumpilo por necesejo kaj desegno sur alumeta etiketo k. m. a. Hju Dingnan, laboristo de Ŝanhaja Elektro-maŝina Fabriko, volis inventi alĝustigilon por la prilaborado per vertikala tornilo. Li kuŝis maldorma sur la malsupra parto de duobla lito dum tuta nokto. Subite inspire de la balanciĝo de la ferlameno sur la lito li trovis solvon por sia problemo, kaj li tuj levigis kriante, "Jen mi trovis la solvon! Jen mi trovis la solvon!" Gi Venhu, alia laboristo de la sama fabriko, dum rigardo al filmo, vidis sur la

ekrano scenon de malferma karbminejo en kiu funkciis elektra fosilego, kies movebla fundklapo de ŝovelplato jen malfermiĝis jen fermiĝis. En tiu ĉi momento li ekkriis "He!" kaj tuj forlasis sian seĝon, por sin okupi en la laborejo pri la malŝarĝkesto de akcesorajoj. Prenante la ŝovelilegon kiel modelon, li elfaris klapon en la fundo de la kesto. Kiam la klapo malfermiĝas, la entenataj prilaborajoj tuj elfalas. Tio dekoble pligrandigas la laborefikon ol per manlaboro, kaj ŝparas laborforton.

La ondo de teknika revolucio ekspansias eĉ ekster la sfero de fabrikoj kaj penetras en diversajn flankojn de socia vivo. Ĉie aperas novaĵoj de "triopa kuniĝo en la familio". Aplikiĝas "triopa kuniĝo" ne nur inter gvidantoj, laboristoj kaj teknikistoj en la fabrikoj aŭ inter fabrikoj, lernejoj kaj sciencaj esplor-institutoj, sed ankaŭ en familioj inter edzoj, edzinoj kaj gefiloj por kune efektiviĝi teknikajn renovigojn. Multaj laboristoj faras projektojn en siaj hejmoj, dum la filoj helpas al ili en desegnado kaj la edzinoj en la farado de modeloj. En dimanĉoj multaj laboristinoj venigis kun si la edzojn al la fabrikoj por helpo. Gju Cajnju, maljuna laboristino de la maldik-fadena laborejo de la Unua Ŝtata Ŝpinteksa Fabriko, Ŝanhajo, ne forgesis renovigon eĉ dum malsano. Ŝi demandis sin, kial "blanka koton" povas esti forigita per koton-suĉilo, sed ne "olea koton" kaj polvo? Kaj ŝi komencis projekti hejme, petante la helpon de sia dektri-jara filo. Sed la knabo neniam vidis la maŝinon kaj li ne povis akiri permeson eniri la laborejon. Ŝi do profitante la okazon viziti la fabrikan kuraciston, venis al la fabriko sinapogante sur la ŝultro de la knabo, kaj tiel la lasta havis okazon observi detale la maŝinon. Prenante medikamenton de kuraca ĉambro, li petakiris medikamentan skatolon, per kiu li helpis sian patrinon fari modelon hejme. La trian tagon, Gju Cajnju resaniĝinte iris al sia laborejo jam kun la modelo de instalajo por forigi ne nur la "blankan kotonon" sed ankaŭ "olean kotonon" kaj polvon.

La nova ŝpinmaŝino en la Ekspozicio de Teknika renovigo kaj Teknika Revolucio de Hjuhuĵ-kvartalo, Ŝanhajo, altiris al si multajn laboristinojn el la urbo Suĝou.

Foto de Hia Daŭling



La ondo de teknika revolucio plene rompis malnovajn tradiciajn kutimojn kaj kreis novan moron. Dum vizitado al la parencoj aŭ amikoj, la interparolo aŭ studo pri teknika renovigo fariĝas ĝia ĉefa enhavo. Multaj laboristoj pasigas sian libertempon, sin okupante pri teknika revolucio. En unu el la loĝdomoj de la Ŝanhaja Fabriko de Ilmaŝinoj loĝas grupo da junuloj. Antaŭe ili pasigis sian libertempon nur per babilado aŭ petolado. La fluego de teknika revolucio kaj la emociaj agoj de kuraĝaj renovigantoj multe tuŝis iliajn korojn kaj

kaŭzis grandan ŝanĝon en ilia penso kaj vivo. Ili organizis sin en "junulara stud-rondon pri preciza fandmuldado" kaj sukcesis trovi rimedon por fari "senskeletan sablokoraĵon". Nun post la laborhoroj, ili aŭ faras eksperimentojn en siaj laborejoj aŭ legas kaj desegnas en sia dormĉambro.

La spirito de komunisma kunlaboro ankaŭ plidisvolviĝis. El la Ekspozicio de Teknika Renovigo kaj Teknika Revolucio disfamiĝis multaj epizodoj pri "amasa respondo al peto de konsilo per afiŝo" kaj "alporto de ne petita informo pri teknikaj novajoj" en diversaj branĉoj de industrio. La oficistoj kaj laboristoj de la Ŝanhaja Unua Fabriko de Plastikaj Plumingo realigis grandan renovigon — per kreo de aŭtomata ole-pumpila muldilo, transformi la duon-mekanikan kaj manlaboran plumingoproduktadon en tiun per buton-premado fare de unu homo, kaj tiel ili plialtigis la produktivecon je pli ol duoblo. Por ke la aliaj samfakaj fabrikoj profitu la novaĵon, ili organizis specialan "taĉmenton de trezor-alportantoj", kiu vizitis naŭ fabrikojn de la sama fako por rekomendi al ili la renovigon, tiel ke la renovigo povis rapide "flori" kaj "fruktiĝi".

Vid-al-vide al tiuj grandiozaj kaj emociaj



Hong Deling, laboristo de la Unua Fabriko de Ŝpin-teksaj Maŝinoj, klarigas al ekspozici-vizitantoj pri sia nove farita universala matrico-gravura maŝino. Foto de Hia Daŭling

scenoj, oni ne povas ne prikanti kaj hurai. La pensoj de Maŭ Ze-dong kaj la Ĝenerala Linio mobilizas la revolucionan konscion de la vastaj amasoj kaj vigligas la subjektivan aktivecon de la homoj, ke ŝprucas la saĝo kaj inteligento kaŝita en la amasoj, kvazaŭ la fluo de Jangzi-rivero antaŭen torentanta je miloj da lioj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Filmo-industrio en Ĉinio

En lastaj du jaroj, Ĉinio produktis ĉ. 180 artajn 544 scienc- edukajn kaj 2,236 dokumentajn filmojn t. e. egale (la artaj eĉ supere) al la tuta kvanto produktita dum 8 jaroj antaŭ la Liberiĝo en 1949. La ideologia kaj arta kvalito estas ankaŭ multe pli alta ol antaŭe.

Ekde 1958, fondiĝis filmo-produktejoj en ĉiuj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj de naciaj malplimultoj escepte de Tibeto. Nun la nombro de filmoproduktejoj atingas 33, el ili 23 estas nove fonditaj depost 1958. Kinejoj kaj aliaj filmoprojekciaj organizoj nombriĝas nun 14,500, t. e. je duono pli multe ol en 1957. Spektantaro de filmoj en 1959 atingis 4,050,000,000 personfojoj, plimultiĝis je 160% kompare kun 1957, t. e. en la du jaroj de granda antaŭensalto oni atingis

la ciferon por kiu oni bezonis ok jarojn en la pasinteco.

La tekniko de filmoproduktado ankaŭ multe progresas. Ekz-e ni sukcesis en produkto de panoramaj kaj stereoskopaj filmoj. Antaŭ la Liberiĝo, ĉiuj materialoj, aparatoj kaj ekipaĵoj de filma industrio estis importitaj, sed nun krom filmobazo, ni jam povas fabriki ĉion alian.

Rapida Teknika Revolucio

En Ŝanhajo, la laboristaro nun per granda energio sin ĵetas al teknika revolucio kaj ĉiam pli rapidigas la paŝojn de mekanikigo kaj duonmekanikigo en la plej malnova industria urbo. Nur en mallonga tempo la mekanikigo kaj duonmekanikigo jam atingis ĉ. 80% kaj liberigis pli ol 200,000 laboristojn el la man- kaj peza korp-laboro. Tio multe plibonigis la laborajn kondiĉojn de la laboristoj kaj rapide altigas la

labor-produktivecon, kaj la produktado de multaj fabrikoj saltas al nova nivelo.

Fervojo sur Sud-okcidenta Altebenajo

Junnan estas provinco ĉe la sudokcidenta limo de Ĉinio. Antaŭe ĝi havis nenian fervojan interligon kun ceteraj provincoj en la lando. Sed nun nova fervojo estas konstruata plenvapore inter Kunming, la ĉefurbo de tiu ĉi provinco, kaj Gujjang, ĉefurbo de ĝia najbara provinco Gujĝoŭ. La fervojo estas unu el la multaj fervojoj sur altebenajo de Ĉinio. Ĝi longas je 668 kilometroj. Post la finkonstruiĝo ĝi povos interligiĝi oriente fervoje kun Guanghi- Guangdong- Gianghi-provincoj por atingi la urbojn Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj aliaj, kaj norde kun Siĉuan kaj aliaj nordokcidentaj provincoj.

Tibeta Popolo Impetas al Demokratio kaj Socialismo

Hie Heĉoŭ, Vicprezidanto de la Komitato pri Aferoj de Naciaj Malplimulto

LA demokratia reformo komencita ekde pasinta junio en Tibeto akiris jam grandajn sukcesojn. Nun, surbaze de la venko de la movado kontraŭ la ribelo, kontraŭ la hulak-servosistemo* kaj persona dependeco kaj redukti la ter-renton kaj interezon, la laboro de terdistribuo estas efektivigita en la plejparto de la agrikulturaj regionoj kaj, en la ceteraj regionoj, ĝi efektiviĝos ĉe la fino de printempo ĉi-jare. En la paŝtaj regionoj la movado kontraŭ la ribelo, kontraŭ la hulak-servosistemo kaj la persona dependeco kaj por la ambaŭflanka profito inter la paŝtlaboristoj kaj brutposedantoj jam komenciĝis en ĉiuj regionoj, kaj en kelkaj el ili sukcese finiĝis.

La vastaj kamparanaj kaj paŝtistaj amasoj multe atingis en tiu ĉi movado. Unue, centoj da miloj da servutuloj, kiuj dependis dum jarcentoj de la bienoj de la mastrosinjoroj, la unuan fojon fariĝis liberaj kamparanoj; pli ol dudek mil sklavoj sin liberigis de la katenoj, kiujn la mastrosinjoroj trudis sur ilin, akiris la unuan fojon la personan liberecon kaj fondis siajn proprajn hejmojn helpe de la popola registaro. Due, en la agrikulturaj regionoj, ĉiu persono ricevis meznombro 3.5 muojn** da kulturebla tero kaj ĉiuj du personoj unu bruton. Domojn aŭ agrikulturajn instrumentojn ankaŭ ricevis tiuj al kiuj ili mankas. En la paŝtaj regionoj, la brutoj de la ribelintaj brutposedantoj estis konfiskitaj kaj disdonitaj inter iliaj antaŭaj paŝtlaboristoj kaj memstaraj paŝtistoj kaj aplikigis la politiko de ambaŭflanka profito inter paŝtlaboristoj kaj brutposedantoj. Tio plimultigis la enspezojn de la paŝtlaboristoj kaj memstaraj paŝtistoj. Trie, la malnovaj ŝuldoj estas nuligitaj. Sur la tero de la ribelintaj mastrosinjoroj ne partoprenintaj la ribelon, estas aplikita la politiko redukti ter-renton kaj interezon. Tio donis al la laboranta popolo ekonomian utilon. Laŭ ne kompleta statistiko, la tuta sumo valoras pli ol 500,000 tunojn da greno, t. e. pli ol 750 kilogramoj por ĉiu persono. Ĉiu liberigita sklavo ricevis entute krom tero, domo kaj aliaj produktaj rimedoj, 1.125 kilogramojn da greno kiel rezerva nutraĵo por la familio.

* *Hulak-servosistemo: la tibetanoj devis liveri senpagajn transportajn rimedojn al la vojaĝantaj nobeloj, lamaoj, oficistoj kaj aliaj kiuj portis atestilon ĝui tian servon.*

** *muo: 1/15 hektaro.*

Post la realiĝo de la demokratiaj reformoj, en la plejparto de la gubernioj kaj urboj de la Tibeta regiono estas fonditaj popolaj registaroj, de kies funkciuloj pli ol 80% estas Tibetaj laboruloj kaj patriotaj, progresemaĵ elementoj, kaj ĉiuj guberniestroj kaj urbestroj estas tibetanoj. En la kamparo estas starigitaj senescepte regionaj kaj vilaĝaj kamparanaj (paŝtistaj) asocioj. En kelkaj lokoj stariĝis eĉ regionaj kaj vilaĝaj popolaj registaroj en kiuj regis Tibetaj laborantaj kamparanoj (paŝtistoj). Post sia fondiĝo, la popolaj registaroj kaj kamparanaj asocioj de diversaj ŝtupoj ludas gravan rolon en plifirmigo de la socia ordo, en gvido de la popolamasoj en produktado, en vasta mobilizado de la amasoj, en la demokratiaj reformoj kaj aliaj laboroj, kaj pro tio ili estas tutkore subtenataj de la vasta laboranta popolo.

Kun progresado de la demokratiaj reformoj multe altigis la produktan entuziasmon de la popolo. Sub gvido de sia propra registaro kaj kamparana (paŝtista) asocio, centmiloj da liberigitaj servutuloj energie komencis grandskalan produktan kampanjon samtempe kun ĝisfunda realigo de la demokratia reformado. Sur la Tibeta altebenajo disetendiĝanta milojn da kilometroj longe kaj larĝe, ĉie regas nova atmosfero de entuziasma produktado. Por atingi pli abundan rikolton ĉijare, en la lokoj, kie efektiviĝis la demokratiaj reformoj, la vastaj kamparanaj amasoj, gvidataj de la Ĉina Komunista Partio kaj helpataj de la registaraj laborantoj kaj la oficiroj kaj soldatoj de la Popola Liberiga Armeo, jam ĝenerale sin organizis en interhelpaj produktaj grupoj, konstantaj, laŭsezonaĵ kaj provizoraj. Tiuj ĉi interhelpaj organizaĵoj akcelas la disvolviĝon de produktado. En 1959, la kamparanoj de diversaj lokoj finis, plifruo ol antaŭe, la aŭtunan rikolton kaj draŝadon ĝenerale je 10-20 tagoj. En la pasinteco, oni plugis vintre la teron nur unu fojon, kaj la profundeco ne atingis 10 centimetrojn; sed en lasta vintro oni plugis ĝenerale du aŭ tri fojojn, ĝis 17-23 centimetrojn profunde. En multaj gubernioj, ĝis la fino de 1959, pli ol 70% de la areo de kulturata tero estis plugita. La tibetanoj antaŭe ne kutimis kolekti sterkaĵojn, sed ĉiljare ili eklernis la spertojn de han-nacio kaj aliaj frataj nacioj kaj formiĝis jam inter ili konkurso por tiu laboro, kiun partoprenis ĉiuj familioj kaj personoj. La kamparanoj en



Fotoj de Li Cangjong

La Tibeta avino Kongoĝolma jam travivis 69 jarojn, sed vere homan vivon ŝi komencis nur post la demokratia reformo.

Kongoĝolma naskiĝis en familio de servutulo kaj devis laboregi por la mastro jam en sia 13-jara ago. Si ne nur ne povis ricevi sufiĉe da manĝo por sia laboro, sed ofte estis batita. Kiam ŝi estis 25-jara, mortis sia patro de penlaborego, kaj des pli mizeriĝis ŝia vivo. Ŝi forlugis de sia hejmloko kun sia edzo kaj tri infanoj por serĉi feliĉon, sed ĉie ŝi trovis nur frostojn kaj malsaton. Ŝia edzo mortis kaj ŝi malsaniĝis je artrito kaj perdis sian irkapablon. Dank' al klopodado de la plej aĝa filo Casidongub fine ili alvenis al Lhasa. Casidongub iris al Samma por perlabori vivimedon, sed kapite kaj denuncite kiel forkurinto el Gebung-templo li fariĝis sklavo de s-ro Kazangngogub. Perdinte sian labor-kapablan filon, Kongoĝolma devis almozpetadi kun sia filino kaj la duonidioti dua filo havante tenadon post Potala-palaco kiel loĝojn.


Post la likvido de la ribelo en Lhasa, ŝia plej aĝa filo liberigis kaj revenis. La reunuiginta familio ricevis dum la demokratia reformo, 90 kal-ojn (ĉ. 6 hektarojn) da tero, tri bovojn kaj unu domon. Nun la suno ekbrilas ankaŭ por ili.

La Suno Ekbrilas Ankaŭ por la Familio de Kongoĝolma

La demokratiaj reformoj liberigis la vastan Tibetan laborantan popolon ne nur politike kaj ekonomie, sed ankaŭ kulture. Nun, diversspecaj lernejoj, precipe elementaj lernejoj, vilaĝaj popul-lernejoj por plenkreskuloj kaj vesperaj lernejoj, rapide kreskis tra la tuta Tibeto. Ekzemple en Canang-gubernio, kie troviĝis antaŭe neniu lernejo, estis fonditaj, ĝis fino de novembro de 1959, 44 elementaj lernejoj kun 2,266 lernantoj, t. e. ĉirkaŭ 60% de la lernagaj infanoj en la gubernio. Nun ĉiu vilaĝo en la gubernio havas sian elementan lernejon kaj ĉiu vilaĝo havas sian popollernejon por plen-

Da laboroj nin atendas ĉiam multo,
Tiel nuna kiel antaŭe.
Sed malsamas draste la rezulto.
En pastino:
manoj malplenas post peno
Sed ĉijare:
Grenejon pleningas greno.

Montsuda regiono jam amasiĝis pli ol 500,000 tunojn da sterkaĵo, t. e. pli ol 5 tunoj por ĉiu persono meznombre. Por la promesaj laboroj la Tibeta popolo kantas:




Supre: 14 jarojn Kongoĝolma mizere vivis en tiu ĉi tendaco.

Deŝtre: La laborgrupo de la Milit-kontrola komitato alportis al la familio de Kongoĝolma grenon.

kreskuloj. En ĉiuj specialaj administraj regionoj de Tibeto, por respondi la urĝan postulon de la leviĝintaj kamparanoj kaj paŝtistoj pri ekposedo de nova produkta tekniko kaj kulturo, estas aranĝitaj, unuj post aliaj, mallongtempaj kursoj pri agrikultura tekniko, por veterinaroj, ŝoforoj, kuracaj laborantoj, instruistoj de elementa lernejo, k. a. Multe da liberigitaj servutuloj kaj sklavoj la unuan fojon eniris lernejon kun lernolibroj en la mano. Ili decideme volas posedi la novajn sciojn por konstrui sian novan hejmlokon.

La venko super la ribelo de la reacia klico de la Tibeta supera socitavolo kaj la sukceso de la demokratiaj reformoj forbalais la obstaklojn sur la vojo al, kaj metis firman bazon por plua disvolvado de la unuiĝo kaj kunlaboro inter la du nacioj han-a kaj Tibeta. En la batalado kontraŭ la ribelo kaj por la demokratiaj reformoj, la unuiĝo kaj kunlaboro de la du nacioj jam firmiĝis kaj disvolviĝis senprecedence. La Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la laborantoj de la han-nacio rigore observas, en ĉiuj laboroj, la politikojn pri naciaj malplimulto kaj pri religioj de la Partio kaj elkore zorgemas pri la

La Suno Ekbrilas Ankaŭ por la Familio de Konĉokĝolma



Supre: Jen la unuan fojon la gefiloj de Konĉokĝolma laboras sur sia propra kampo.

Maldekstre: La laborgrupo de la militkontrola komitato distribuis 2 bovidojn kaj 1 laktobovinan al Konĉokĝolma.

La reacia servuta reĝimo pelis Konĉokĝolma al vagado, almozetado kaj suferado de artrito, kaj dispelis ŝiajn karulojn, sed la Komunista Partio reunuigis ŝian familion kaj malfermis por ili novan feliĉan vivvojon.



vivmalfacilajoj de la popolamasoj. Ĉie kie ili troviĝas, ili zorgas pri la mizero de la amasoj, helpas ilin plugi, semi, rikolti kaj draŝi kaj hakas brullignon, transportas akvon, kuracas malsanulojn por ili. Ekzemple la trupoj de la garnizono en la Montsuda Speciala Administra Regiono helpis la popolon, sole en majo de 1959, pli ol mil labortagojn en plugado, sarkado kaj konstruado de kanaloj. Krome, ili plantis 3,290 arbojn, portis al kampo pli ol 130 tunojn da sterkajoj, tondis harojn por 495 loĝantoj kaj kuracis malsanulojn je pli ol 1,700 homo-fojoj. Dum la demokratiaj reformoj, la kadroj de han-nacio manĝis, loĝis kaj laboris kune kun la popolamasoj. Ili enradikiĝis inter ĉi tiujn por bone kompreni ilian vivcirkonstancaron kaj ilin mobilizi. En la regionoj kie efektiviĝis la demokratiaj reformoj, la kadroj kaj la popolamasoj kune laboras por pli abunda rikolto. El ĉio ĉi tio la Tibeta popolo klare konstatis ke la han-naciaj laborantoj, oficiroj kaj soldatoj de la Popola Liberiga Armeo staras kune kun ili sortligite kaj samspire, tiel en la lukto kiel en la produktado. Pro tio naskiĝis inter ili senkompara amikeco kaj plena konfido al la han-voj. La tibetanoj dankeme nomas la Popolan Liberigan Armeon "Diaj Trupoj" kaj laŭdas la kadrojn de la Komunista Partio kiel "la plej fidindajn kaj plej karajn homojn". Ili diras: "La han-naciaj kadroj kaj la membroj de la Popola Liberiga Armeo, venintaj al Tibeto, ne parolas la Tibetan lingvon, sed havas la saman koron kiel ni; male la reakcia supera socitavolo de Tibeto parolas la Tibetan lingvon, sed havas koron tute malsaman al la nia." La Tibeta popolo traktas la liberigajn armeanojn kaj la han-naciajn laborantojn kiel siajn proprajn fratojn. Ekzemple kiam la trupoj de la Liberiga Armeo de garnizono en Montsuda Speciala Administra Regiono revenis al la garnizonejo, la popolamasoj propravole iris ĝis unu kilometro malproksimen por ilin bonvenigi kaj helpis ilin transporti objek-

tojn, purigi ĉambrojn, sterni tapiŝojn kaj alporti akvon el la rivero. Viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj knaboj, amasiĝis ĉirkaŭ ilin por pridemandi ilian farton, kaj salutis per kantoj kaj dancoj. Tio plene montras la nacian solidarecon kaj la intimajn kaj familiarajn rilatojn inter la armeo kaj la popolo.

Per siaj propraj spertoj la Tibeta popolo profunde komprenas ke ili povos akiri radikalan liberigon kaj feliĉon nur se ili sekvos fidele siajn savintojn: la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Zedong. Plenaj je varma amo al ili la tibetanoj kantas:

*Ne degelas glacio sen suno,
Nek prosperas la arboj sen pluvo.
Sen demokratia reformado
Lumo neniam venus en koron de kamparano.
Ho, akceptu nian katak-on*** blankpuran,
Kaj eldrinku tason da hordean vinon plej
bongustan,*

La plej kara nia!

La Tibeta popolo jam sen ŝanceliĝo surpasis la demokratian kaj socialisman vojon. Ĉiuj laborantaj popoloj kaj ĉiuj justamaj kaj progresemaj homoj en la tuta mondo ĝojas kaj aklamas pro la nuna feliĉa vivo de nia Tibeta popolo. Kiom ajn energie la imperiistoj kaj malmultnombraj eksterlandaj reakciuloj, revenigas la animon de la mortinta klaso de la Tibetaj reakciaj sklavoposedintoj, ili ne povas ĝin revivigi. Ni lasu la imperiistojn kaj plenmanon da eksterlandaj reakciuloj ĝin priploregi! La vasta Tibeta popolo, sub gvido de la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, impete marŝas antaŭen kun plena kredo sur la vojo al demokratio kaj socialismo!

*** katak-o: peco da silkaĵo per kies prezento la tibetanoj montras sian respekton kaj bonvolon.

Korespondi deziras

* **Letervesperon aranĝos** la Esper-rondo la 28-an de aŭg. Bv. tuj sendi gratulleterojn kaj pk. al K-do Krolikov S. N. USSR. Stalino, 48, obl., ul. Artema 157.

* **Fanis Markots**, Brivibas iela 13, Livani, Latvia SSR. USSR.

* **Elmar Paavo**, 46-jara laboristo, USSR. Tallinn, Färve 48-16.

* **S. Bassin**, ĵurnalisto kaj malnova esp-isto, dez. kor. kun orientaj landoj. Ĥoroŝinskaja 7, Taŝkent 18, USSR.

* **Anoj de Esperanto-Klubo "Sputnik"** dez. kor. kun ĉl. USSR. Moldavio, Tiraspol, Dom Kultury, Esperanto-klubo "Sputnik".

* **Por verkado de priesperantaj sciencaj studoj** mi bezonas diversajn Esperantajn vortarojn (Esp-naciaj, naci-Esp-aj, fakaj) kaj studojn koncernantajn problemojn de internacia lingvo. Rekompenco laŭ interkonsento. Boris Kolker, ĉefa poŝtoŝefo, Esperanto, Tiraspol, Moldavio, USSR.

Geklubanoj de Ikuno Altlernejo,

Ikuno OSAKA, Japanujo, atendas bildkarton kun facilaj frazoj, de la tuta mondo. S-ro Okumura-Rinzo, ĉe Ikuno Altlernejo, Ikuno Osaka, Japanujo.

Esperantaj organizaĵoj, rondetoj, kaj apartaj esperantistoj estas petataj sendi al ni kontaktigleterojn, diversajn esperantajjn, bildkartojn, prospektojn, por nia esperantista ekspozicio, okazonta ĉijare. Ĉiu sendinto ricevos belan bildkarton de nia rondeto kiel dankesprimon. Adreso: **Esperanta Rondeto "NEMUNAS"**, Kaunas HES, Litova SSR. Gorkio 8-3.

Eterna Amikeco

Korespondo el Hindio

FINIGIS la neforgesebla 81-taga ekspozicio. Fermiĝis la ruĝaj palacaj pordoj de la Ĉina Ekspozicia Pavilono de la Tutmonda Agrikultura Foiro en Nova Delhi-o, ĉefurbo de Hindio. Sed en tiu nokto venis al la Ĉina Pavilono hinda kamparano, kiu en la nomo de la kamparanoj de sia vilaĝo en Punjab-provinco, invitis ĉinajn kamparanajn laborantojn gastigi ĉe ili. Antaŭ dek tagoj li vizitis la Ĉinan Pavilonon kaj reveninte sian hejmon li konigis siajn impresojn al la samvilaĝanoj. Tio estigis ĉe ili fortan deziron veni al Delhi-o. Sed estante tiel multenombraj, kiel ili ĉiuj povus iri al la ĉefurbo. Post longa interkonsiliĝo ili konkludis, ke plej praktike estus inviti la ĉinajn kamparanojn gastigi ĉe ili. Do la reprezentanto venis de la malproksima vilaĝo kaj diris al laborantoj de la Ĉina Pavilono sincere: "Iru! Ĉio estas jam preta. Ni ĉiuj atendas la honoran viziton de niaj ĉinaj kamparanoj-fratoj. . . ."

Hindaj fabrikantoj de agrikulturiloj primezuras la rapidan rikoltilon por fari tian instrumenton imite.

Foto de Gia Hiujin



Tio okazis je la 29-a de februaro en 1960, t. e. en la sama tago, kiam aperis sur la frontpaĝo de ĉefurbaj gazetoj de Hindio kun plenampla titolo la informo pri la respondo de Ĉefministro Ĝou En-laj la Ĉefministro J. Nehru anoncanta la viziton de la antaŭa al Nova Delhi-o en aprilo, por okazigi interparolon inter la du ĉefministroj. Tiu ĉi informo konsiderata kiel "la plej bona novaĵo" de vasta hinda popolo alportis al la Ĉina Pavilono specialan kortuŝan atmosferon, en la lasta tago de la Foiro.

Ĝus post la 1-a horo posttagmeze, kiam ankoraŭ ne venis la tempo por akcepti vizitantojn, antaŭ la Ĉina Ekspozicia Pavilono atendis jam amaso da hindaj rigardantoj. En la daŭro de 81 tagoj tie ĉiam tajde svarmis hom-amasoj. La dumil-jara amikeco inter Ĉinio kaj Hindio ja ne estas rompebla de iuj ajn reakciaj fortoj, malgraŭ certaj hindaj reakciuloj faris ĉiajn intrigojn por bojkoti kaj subfosi la Ĉinan Pavilonon antaŭ kaj post ĝia malfermo. La fakto, ke pli ol tri milionoj da hindoj de diversaj socitavoloj vizitis ĝin dum la 81 tagoj, plej bone montris, kiel profunda estas la amikeco inter ĉina kaj hinda popoloj. Hindaj kamparanoj laŭdis la Ĉinan Pavilonon kiel "la plej interesan". Hinda agronomo asertis, ke ĝi "entenas tre riĉajn agrikulturajn sciojn". Hindaj poetoj tie kolektis kantojn verkitaĵojn de ĉinaj kamparanoj dum la granda antaŭensalto. Agrikulturaj laborantoj el diversaj lokoj de Hindio venis por interŝanĝi agrikulturajn spertojn kaj studi kiel Ĉinio, lando kun loĝantaro eĉ plimultnombra ol Hindio, solvis la nutran problemon. Ankaŭ Ĉefministro J. Nehru tien vizitis kelkajn tagojn antaŭ la fermo de la Foiro.

Vidu! Venis denove la blankhara laktbovineja laboristo interpuŝiganta en la homamaso. Kunportante 4 pakajojn sub la maldekstra brako kaj kondukante sian fraton, li trapenetris la homamason, rekte al Ĉen Bingjin apud la elektre funkcia modelo de la Ĝajaŝan-a Popola Komunumo en Henan-provinco de Ĉinio. Tio jam estis la 15-a fojo de lia vizito al la Ĉina Pavilono. Antaŭ unu monato li interkonatiĝis tie kun Ĉen Bingjin, la estro de Ĝajaŝan-a Popola Komunumo. Iliaj koroj de labor-

antaj popolanoj tuj firme interligiĝis. Kvankam ili tute ne konis unu la alian antaŭe kaj loĝas dise je dekmiloj da kilometroj, tamen ili havis similajn spertojn. Ili intime babilis, kune sin fotis kaj baldaŭ ili intimiĝis kiel fratoj. La simpla hinda laborulo vidis, ke Ĉen, ĉiam okupata ne povos gastigi en lia hejmo, li do pretigis kaj alportis hindajn vinon, manĝaĵojn, fruktojn, cigaredojn kaj delikatajn frandaĵojn kun sia tuta familio al la Ĉina Pavilono por renkonti Ĉen. En la lasta semajno antaŭ fermo de la Foiro li ja vizitis Ĉen ĉiutage. Hodiaŭ li denove propramane malfermis la pakadojn de hindaj frandaĵoj kaj petis Ĉen ankoraŭfoje gustumi. Li diris: "Estos malfacile por mi vin revidi de morgaŭ, sed la sinceran koron de ĉinoj mi neniam forgesos. Hindio kaj Ĉinio ja estas veraj fratoj. Por la eterna amikeco inter niaj du landoj mi preĝos ĉiutage per la akvo de la rivero Ganĝo!"

La 29-a de februaro ne estis ferio, tamen en la Ĉina Pavilono okupanta pli ol sepdek mil kvadratajn futojn svarmis homaj kapoj. Kiom da vizitantoj utiligis la lastan ŝancon en kelkaj horoj por noti la spertojn kaj konkretajn paŝojn por riĉa rikolto afiŝitajn sur la muroj aŭ intervjuis ĉinajn specialistojn kaj estrojn de iuj ĉinaj popolaj komunumoj por interparoli pri neklaraj problemoj. . . .

Dum la 81 tagoj la Ĉina Pavilono aranĝis jam pli ol 800 kunsideojn pri teknikaj problemoj por la vizitantoj kaj pli ol 800,000 ekzempleroj de klarigoj pri la ekspoziciataj materialoj estis distribuitaj. La pakajetoj kun semoj de ĉinaj altproduktaj grenoj estis precipe konsiderataj de hindaj kamparanoj kiel plej alte valoraj donacoj. Dudek kelkaj tagoj antaŭ la fino de la Foiro, laborantoj de la Ĉina Pavilono vizitis la altan turon ekster Nova Delhi-o. Tion sciinte lokaj kamparanoj tuj ilin ĉirkaŭis kaj petis la semojn de la ekspoziciata sorgo alta je 5 metroj. Estas vaste konataj tiuj altrikoltaj grenoj kaj maŝinoj por rizplantado en la Ĉina Pavilono. Venadis ĉiutage leteroj eĉ el malproksimaj provincoj petantaj semojn aŭ teknikajn materialojn. Jen sur la placo ekster la domo alvenis, foriris kaj alvenis denove, onde homamasoj. Ili desegnis aŭ fotis ĉirkaŭ maŝinoj por rizplantado por legomsemado kaj simplajn rikoltajn maŝinojn. Antaŭ unu semajno la Pavilono de Madras-provinco de la Foiro helpate de la Ĉina Pavilono jam faris lignan rizplantadan maŝinon laŭ la modelo de Liling-gubernio de Hunan-provinco kaj ĝin ekspoziciis en sia pavilono. Hodiaŭ venis denove sendito de tiu ĉi Pavilono por peti prokraston de pakado de alia fera rizplantada maŝino, de modelo "NAN 105 B". Ĉar ili jam fotis ĉiujn pecojn de la maŝino kaj faris laŭ ĝi imitajon. Kaj ili esperis, ke la ĉinaj amikoj ankoraŭfoje ilin helpos en la kontrolado de la nova imitajo. La laborantoj en la Ĉina Pavilono tuj akceptis la peton. La sendito de la Madras-Pavilono estis ege ĝojigita



Hindaj kamparanoj foje kaj refoje vizitis la ĉinan pavilonon. Jen ekspozicia modelo pri la Ĉajaŝan-a Popola Komunumo de Sujping-gubernio ilin multe interesas.
Foto de Gia Hiuĵin

kaj ne sciis kion diri dankeme etendante siajn manojn.

Iu hinda laboristo, kiu foje interparolis kun Luo Ŝifa, estro de Hinmin-a Popola Komunumo, Siĉuan-provinco, vizitis Luo-n denove en la lasta tago de la Foiro. Li donacis al Luo unu rakedon por badmintono* dirante: "Vi scias, ke mi estas malriĉa kaj ne povas aĉeti por vi ion valoran. Nu akceptu tiun ĉi rakedon por via komunumo!" Oni povas imagi kiel emociita estis Luo, kiam li akceptis tiun donacon kaj manpremis kun tiu hindo. Sennombraj hindaj popolanoj jam komprenas, kio estas popola komunumo, dank' al la ekspoziciaĵoj de la Ĉina Pavilono de la Foiro kaj la klarigoj de ĉinaj kamparanoj. Ili skribis en la memorlibron gratulajn vortojn pri la granda sukceso de la popola komunumo, ke: "Tio estas simbolo de la decidemo de la ĉina popolo por forskui eterne la malriĉecon kaj konstrui sian feliĉan vivon." Ili ne plu kredas la mensogojn de la reakciuloj, ke "popola komunumo estas bazita sur deviga sklava laboro" ktp. Iu vizitinto el Bengal-provinco skribis en la libro: "Nur post liberiĝo de sklaveco la agrikulturo en Ĉinio povas akiri tiel grandan sukceson. Tio estas brila modelo de la plena disvolviĝo de la homa saĝo kaj kreemo!"

La senĉese venantaj hindaj vizitantoj per sinceraj vortoj esprimis sian varman gratulon kaj



La abundrikoltaj kotonplantoj elkulturitaj de popolaj komunumoj estas unu el la plej interesaj ekspoziciaĵoj por la hindaj terkulturistoj.

Foto de Gia Hiujin

amikan bondeziron en la memorlibro. Oni sentas des pli grandan valoron de amikeco ĉe la adiaŭo. Iu laboranto en la Laboratorio pri rizplanto en Bombaj-o donacis al S-ro Jan Gi, ĉina specialisto pri rizo, belan artaĵon kiel memorajon, kiam li adiaŭis tiun en la lasta tago de la Foiro. Alia respondeculo de iu laktobovinejo alvenis por ankoraŭfoje inviti S-ron Hjong Deŝaŭ, ĉina specialisto pri brutobredo gastis en lia hejmo antaŭ la foriro. La Centra Botanika Ĝardeno en la Norda Provinco interŝanĝe alsendis arbidajn deziratajn de la Ĉina Pavilono kaj esperas daŭran interŝanĝon de spertoj agronomiaj.

Eksonoris. Venis fine la signalo de fermiĝo de la Foiro daŭrinta jam 81 tagojn. Sed sufiĉe multe da vizitantoj ankoraŭ volis eniri por rigardi en la lasta momento. Post kiam la rigardantoj elpaŝis kun bedaŭro la ruĝan pordon de la Pavilono, alia kortuŝa sceno prezentiĝis en la granda ekspozicia halo: La hindaj klarigistoj kaj laborantoj kiuj deĵoris en la Pavilono dum pli ol du monatoj adiaŭis siajn ĉinajn amikojn kun granda bedaŭro. Antaŭ kelkaj tagoj ili korinklĉine kunkantis la kanton "Amikecon inter Hindio kaj Ĉinio", kaj nun ili interŝanĝis adresojn, fotojn kaj memorajojn. . . . La hinda klarigisto de la modelo de Ĝajaŝan-a Popola Komunumo alkroĉis sur la bruston de S-ro Ĉen Bingjin, estro de la nomita komunumo medalon kun bildo de fluganta kolombo. Kaj Ĉen firme premis liajn manojn kaj dankis lian diligentan laboron por la Ĉina Pavilono en lastaj du monatoj. Li ĉiutage laboris en la Pavilono kaj neniam ripozis eĉ unu tagon dum la daŭro de la Foiro. Foje li falis de la biciklo kaj vundiĝis, sed eĉ tiam li ne ripozis kaj venis lame al la Pavilono, kaj staris tuttage ĉe la modelo klarigante foje kaj refoje al la vizitantoj, la grandan ŝanĝon de Ĝajaŝan-a Popola Komunumo. Ho, vere neforgesebla amikeco!

Iu hinda amiko, klarigisto por la parto de industrio de la popola komunumo, prezentis sian foton kaj unu gruan skulptitan el bovkorno al Ma Baŝan, estro de Hangiava-a Popola Komunumo en Hebej-provinco, kiel memorajo de ilia amikeco, kaj humore diris: "Se mi iam ajn vin forgesus, algluigu mia lango al la palato ke neniam mi povu paroli."

Manĝotabloj longe viciĝis en la ekspozicia halo. La amikoj kunlaborantaj dum 81 tagoj havos adiaŭan kunmanĝon hodiaŭ vespere. Tiam oni sentis des pli grandan intimecon al la du grandaj fotoj sur la muro, kiuj montris Ĉefministrojn Ĝoŭ Enlaj kaj J. Nehru dum ilia intervizito en Nova Delhi-o kaj Pekino reciproke. Kiom da vizitintoj tie pasis ĉiutage antaŭ ili kaj ameme fiksas sian rigardon al ili. S-ro Kitchlew — filo de la fama hinda pacdefendanto D-ro Saifuddin Kitchlew — kiu estis ankaŭ kunlaboranto de la Ĉina Pavilono, diris emocie en la adiaŭa festeno: "Ĉefministro Ĝoŭ baldaŭ venos al Hindio en aprilo por viziti Ĉefministron J. Nehru. Tio estas la plej plej bona novaĵo. Ekde antikveco niaj du landoj amike rilatiĝas. Nun dank' al la klopodado de la ĉefministroj kaj popoloj de niaj du landoj, la nubo kiu vualas niajn du landojn, sendube malaperos tre baldaŭ. Ni do ĉiuj klopodu por tio!"

Belega estas la printempa nokto en Nova Delhi-o. En la lasta vespero de la Tutmonda Agrikultura Foiro, ĉiuj ĝiaj Pavilonoj ĉu de la eksterlandoj ĉu de la provincoj aŭ la centra registaro de Hindio, estis pompe iluminataj per diversaj koloraj lumigiloj. Tio aldonis al la Placo de la Foiro kroman belecon kaj allogecon. La ferman ceremonion persone direktis Ĉefministro J. Nehru. Sarvapalli Radhakrishnan, vicprezidanto de Hindio disdonis premiojn. Artaj fajraĵoj leviĝis unu post alia en la nokta ĉielo. Fermiĝis nun oficiale la Tutmonda Agrikultura Foiro daŭrinta 81 tagojn. Homoj svarme alvenis al la reprezentantoj de la Ĉina Pavilono por amike ilin manpremi kun ĝojkrioj: "Hinda kaj ĉina popoloj estas fratoj!" kaj gratuli pro la granda sukceso kiun la Ĉina Pavilono akiris en Nova Delhi-o!

Estas neforgeseblaj la 81 tagoj kiujn pasigis la Ĉina Ekspozicia Pavilono en Hindio. La laborantoj en la Pavilono plene spertis el tiuj tagoj la profundecon de la amikeco inter ĉina kaj hinda popoloj. Ili ĉiuj klare memoris ankoraŭ kion diris adiaŭante la hinda kamparano, kiu vizitis la Ĉinan Pavilonon en la nokto de la fermiĝo de la Foiro, kaj ĝoje ricevis la deziratajn semojn de rizo, maizo kaj sojfabo el Ĉinio: "Lasu tiujn ĉi semojn bone flori kaj frukti sur la tero de hinda lando. Ni memoros por ĉiam la amikecon de niaj ĉinaj fratoj!"

* *Badmintono* — speco de ludo, iom simila al teniso en kiu plumprovizita korko estas ĵetata trans reto per malpeza rakedo.

LETERALVOKO

al esperantistoj-pacamantoj en la mondo

Karaj geamikoj kaj gesamideanoj,

Antaŭ nelonge, ni ricevis el diverslandoj de niaj esperantistaj geamikoj kaj gesamideanoj plurajn leterojn, kiuj kun celo subteni la batalon de la vjetnama popolo kontraŭ la politiko de persekuto kaj teroro de la kliko Usono-Dziem en Sudvjetnamio, firme postulis ke la registaro de Ngô-dinh-Dziem redonu liberon al sinjoro Hoàng-lê-Kha.

Sro Hoàng-lê-Kha estas malnova nacilibera rezistmilitanto, kiu depost la restariĝo de paco en Hindoĉinio, revenis al sia familio por labore gajni sian vivon. Sed, la registaro de Ngô-dinh-Dziem, laŭ ordono de usonaj imperiistoj, malatente al la Ĝenevaj Konvencioj aplikis politikon de revenĝo kontraŭ la rezistmilitintoj. La 15-VI-1959, senmotive ili arestis sinjoron Hoàng-lê-Kha, kaj la 2-X-1959, post ĉiuspecaj kruelaj torturoj, surbaze de tute kalum-

naj motivoj ili akuzis lin antaŭ speciala milita kortumo, kiu kondamnis lin al morto; tute same la 29-XII-1959, post kalumnioj ili kondamnis 3 homojn (Vo-van-Khôn, Ngô-quang-Thanh, Nguyên-van-Dan) al morto kaj tri aliajn (Vo-van-Xuong, Duong-van-Lê, Trân-van-Hâu) al vivdaŭra punlaboro. Ĉiuj tiuj estas malnovaj nacilibera rezistmilitantoj.

En la momento kiam la Internacia Kontrolo kaj Supervida Komisiono en Hindoĉinio estas ekzamenanta tiujn kontraŭlegajn procesojn, dum la tuta vjetnama popolo samkiel la internacia opinio firme kontraŭstaris la faŝisman leĝon en okt. 1959 kaj firme postulis la liberigon de s-ro Hoàng-lê-Kha kaj de la supre menciitaj homoj, tiam la sudvjetnama registaro, en 12-III-1960, gilotinis sinjoron Hoàng-lê-Kha, en provinco Tây-ninh!

Tia malhomeca ago de la sudvjetnama registaro ne nur grave atencis al la 14a paraĝrafo de la Ĝenevaj Konvencioj, sed ankaŭ ĝi estis aroganta provoko al la vjetnama kaj al pacamaj, justecamaj kaj humanismaj popoloj en la mondo.

Karaj geamikoj kaj gesamideanoj,

Ni esperas, ke pro la kaŭzo de paco kaj de justeco, vi daŭrigu vian subtenon al la batalo de la vjetnama popolo, vi ekaŭdigu vian voĉon antaŭ la mondo protestante kontraŭ la krimego de la sudvjetnama registaro. Via voĉo estos por nia popolo granda stimulo, celanta deteni la hommortigan manon de la kliko Usono-Dziem en Sudvjetnamio nune minacitaj de la kruela politiko de persekuto de la registaro de Ngô-dinh-Dziem.

Hanoi, la 28an de marto 1960

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio
(15, Tô Hiên Thành, Hanoi)



Sur Nia Librobreto

Lernolibro de Esperanto — Nove eldoniĝis en Litovio, USSR, kompilita de Ip. Ciešk kaj J. Petrulis. La lernolibro enhavas tri partojn: konciza gramatiko kun ekzemploj kaj ekzercoj, riĉenhava krestomatia kaj Esperanto-litova vortareto. 170 paĝoj kun formato 15 × 22.5 cm., bindita.

Kvankam en la unua parto la gramatika klarigo estas en litova lingvo, kiun mi ne komprenas, tamen mi povas vidi, ke komparo inter Esperanto kaj la litova

lingvo estas bone utiligata por helpi la litovojn pli facile mastri la novan lingvon. Ekzemple, komparo estas farita inter la ses kazoj de la litova lingvo unuflanke kaj la du kazoj helpe de prepozicioj de Esperanto aliflanke. Sufiĉa atento estas donita ankaŭ al la reguleco kaj scienceco de la tabelaj vortoj, gramatikaj finoj, participoj, afiksoj kaj vortfarado, ĉion tion ellerninte, eble la litovoj jam havas nenian malfacilaĵon en frazokonstruado, en legado de

diversaj Esperantaj legajoj, tial la aŭtoroj tute ne tuŝas la problemon de sintakso en la gramatika parto kaj jam transpasas al la krestomatia parto. Por ni ĉinoj, kies patra lingvo estas ne tiel proksima al Esperanto kiel tiuj de la eŭropanoj, ne nur morfologio sed ankaŭ sintakso de Esperanto estas lernenda en gramatiko.

Trafoĵumo de la krestomatia donas veran plezuron. Ĝi enhavas utilajn konversaciajn frazojn, praktikajn konversaciojn, saĝajn litovajn kaj Esperantajn proverbojn, ekzemplojn de leterskribado kiuj ankaŭ montras internacian amikecon, interesajn fabelojn kaj fabelojn. El ĝi oni ankaŭ povas kun plezuro gustumi litovan kaj rusan literaturon, kun estimo koni kaj kompreni la heroan patriotan litovan nacion legante tian rakonton kiel "Tombejo de Herooj".

Tia krestomatia ne nur montras al la lernantoj-komencantoj la riĉan kaj taŭgan enhavon de Esperanta literaturo, sed ankaŭ estas fruktodona legajo al tiuj kiuj jam ellernis la lingvon.

Trafoiumante mi trovis kelkajn preserarojn kaj uzadojn miaopinie dubindajn kaj ilin listigas jene, esperante iomete kontribui mian forton al la plibonigo de la valora laboro:

<i>paĝo</i>	<i>linio</i>	<i>Eraraj aŭ dubindaj</i>	<i>Korektoj aŭ opinioj</i>
39	5	demalsupre ĉu . . . , ĉu . . . , sed	'sed' forlasinda
39	2	„ dum aŭtune	'dumaŭtune' aŭ 'dum aŭtuno'
61	7	„ la antaŭtage	la antaŭan tagon
61	6	„ post morgaŭ	postmorgaŭ
67	16	„ egzistas	ekzistas
82	2	demalsupre iliai	iliaj
91	15	„ patrojon	patrujon
128	11	„ kontrarevolucio	kontraŭrevolucio
132	4	„ iu ĉi	tiu ĉi

La lingvo, precipe de la krestomatia parto, estas neriproĉeblе altnivela, bonstila, tamen gramatike, miaopinie, la ekzemplaj

frazoj kaj ekzercoj ankoraŭ ne estas tute seneraraj, sed sendube facile perfektigeblaj.

V. Fon



Katalogo pri la kolektoj de IEMW, Ila parto — En la I-a parto 461-paĝa pli antaŭe aperinta oni povas bone koni la riĉecon de Esperanta literaturo kolektita en la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Nun eliris la II-a parto, kiu entenas literaturon pri movado de internacia lingvo. La 93-paĝa katalogo enlistigis librojn koncernantajn 155 diversajn projektojn, sistemojn, provoĵn, eksperimentojn pri internacia lingvo kiel Volapük, Ido, Occidental, Interlingua ktp. Ĝi liveras utilajn kaj riĉajn materialojn por tiuj, kiuj volas serioze studi la evoluon de la historio de internacia lingvo. Por ni, esperantistoj, ĝi precipe donas drastan kontraston inter la granda vivforto de Esperanto kaj mizero de la ceteraj klopodoj en tiu ĉi kampo. Oni vidas en la I-a parto, ke sole la literaturo de Esperanto okupas plenajn 461 paĝojn, sed en la II-a parto la eldonajoj de 155 sistemoj atingas nur 93 paĝojn! Cifere nekompareblaj! Due ĝi per faktoj prezentas tre bonan instruon al batalantoj de la ideo de Inter-

nacia Lingvo, ke senesperaj estas tiuj, kiuj volas la venkon de Internacia Lingvo sed for de Esperanto. Inter la iniciatintoj de la 155 sistemoj ja ne mankas famuloj kaj eminentaj lingvistoj kaj ni povas diri ke troviĝas en iuj sistemoj eĉ punktoj aparte konsiderate iel superaj al Esperanto. Sed ili fiaskis kaj pli bedaŭrinde malutilis al la komuna batalo de internacia lingvo. Ĉar la mondo ĝenerale ankoraŭ ne akceptas internacian lingvon jam sufiĉe disvastigitan, des pli malfacile por ĝi akceptian novenaskiton samspecan. Kontraŭe la apero de tiaj konkurantoj pli-malpli estigis haoson inter la amikoj de internacia lingvo kaj reduktis la forton de la batalantaro de la ideo.

La broŝuro estas gume kungluita surdorse kun formato 20.7 × 29 cm. Prezo kun afranko 14 resp. kup. aŭ egala valoro en bankbiletoj. Akirebla ĉe la eldoninto S-ro Hugo Steiner, Internacia Esperanto-Muzeo Wien, I., Hofburg, Aŭstrio.

H. F.

ESPERANTO



Du japanaj esp-istoj vizitas Ĉinion

Invitite de la Ĉina Popola Asocio por Kulturaj Rilatoj kun Fremdaj Landoj grupo el 10 japanaj lingvistoj vizitas nian landon por esplori la reformon de han-lingva skribsistemo. Inter ili estas du esperantistoj, la grupestro D-ro Toki Zenmaro (ĉefkonsilanto de la Komitato de Nacilingvo-Esplorado de Japanio kaj direktoro de JEI) kaj grupano Prof. Iĉiro Takasugi (konsilano de JEI). Por ili ĈEL okazigis bonvenigan tekunsidon la 13-an de aprilo, posttagmeze, en Internacia Klubo, Pekino. Ĉirkaŭ dudek Pekinaj esperantistoj havis tre agrablan kaj amikan interparolon kun niaj honoraj gastoj.

En la kunsido estis plene montrita la reciproka simpatio inter ĉinaj kaj japanaj esperantistoj kaj ilia komuna volo lukti por mond-paco. Estis rememoritaj malnovaj personaj interrilatoj kaj kunlaboroj inter ĉinaj kaj japanaj samideanoj, kaj ankaŭ pri la ricevitaj subpremoj de la progresemaj esperantistoj de ambaŭ landoj flanke de siaj reakciaj registaroj en la pasinteco. Tusiĉa estis ankaŭ la temo pri la reformo de skribsistemo de la ĉina kaj japana lingvoj, por kiu ambaŭlandaj esperantistoj havas grandan intereson.

Kun granda intereso la kunsido aŭskultis la rakontadon de Prof. Takasugi pri la situacio de japana Esperanta movado antaŭ, dum kaj post la dua mondmilito. Li rimarkigis ankaŭ la diferencon trajton de la Esperanta movado en ambaŭ landoj troviĝantaj en malsamaj politikaj situacioj. Li esprimis sian admiron al la atingoj de ĉinaj esperantistoj, sed modeste silentis pri la fakto, ke ĉinaj esperantistoj multe lernis de la japanaj, kaj havas sinceran esti-



mon al iliaj progresemaj esperantistoj-pioniroj, kiaj s-ano Akita k. a. kaj al ilia serioza studo de la lingvo kaj esperantologio.

La vizito de D-ro Toki kaj Prof. Takasugi certe pliintimigos la rilaton inter la esperantistoj de ambaŭ landoj en sia komuna strebado por mondpaco kaj interpopola kompreniĝo pere de Esperanto.

Renkontiĝo de vjetnamaj esperantistoj-pacdefendantoj

Vespere de la 20a de marto 1960, okazis ĉe Esperanto-klubo en Hanoi signifoplena renkontiĝo, kies programo konsistis el du



Foto farita post la tekunsido por bonvenigo al niaj japanaj honoraj gastoj. En la unua vico (demaldekstre) la 2-a estas la junkora 74-jarulo D-ro Toki kaj la 4-a Prof. Takasugi.

NEKROLOGO

S-ano Aleksandro Erjuhin, fervora Esperanto-pioniro en Sovetio, forpasis je la 25-a de novembro, 1959 en Arĥangelsk.

Li naskiĝis en 1901 en Ĥolmogri, esperantistiĝis ekde 1926 kaj gvidis E-movadon en la vasta norda regiono de Sovetio. Li estis membro de CK de SEU dum 1931-1935, kaj la sekretario de Norda Komitato de SEU dum 1926-1935.

Li organizis kaj gvidis la korespondadon de arbaristoj kun ĉinaj kaj alilandaj samprofesianoj, kaj la interligon de junularo. En 1932 li aperigis rimarkindan ruslingvan broŝuron pri la sperto de sia internacia korespondo.

Estu la tero de hejma nordo al li malpeza!

Ed. Dancis

partoj. La unua parto estis dediĉita al la kontraŭ-Usona-imperiisma Tago en Sud-vjetnamio 19a/3 kaj al la Azi-Afrika Solidareca Tago 23a/3, pri kies signifoj priparolis samideano NGUYEN-DUC-QUY, prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. Ci-okaze, la Asocio disvendis belajn stelojn kaj plurajn esperantaĵojn, por fondi kason subtenantan al Alĝerio kaj Azi-Afrikaj alilandoj, kiuj estas luktantaj por sia sendependeco.

La dua parto estis por la distribuo de lerno-atestoj al juse sukcesintaj partoprenintoj en la unuagrada kaj duagrada ekzamenoj. Invititoj al tiu solenaĵo tre miris pro la flujaj elparoloj de novaj esperantistoj, kiuj nur post ĉirkaŭ 40 horoj de lernado, povis en la bela lingvo esprimi sian konvinkon labori por la ideo de paco kaj la interpopola amikeco de Zamenhof. Oni speciale rimarkis unu esperantisto-blindulon, kiu memlernis per la metodo "Brajlo" kaj gajnis eminentan premion de la duagrada ekzameno.

V. P. E. A.

Esperanta Geologo-Klubo

Fondiĝis unua en Pollando kaj en la tuta mondo Esperanta Geologo-Klubo je la 2-a de aprilo, 1960. La klubo interesiĝas pri diversaj problemoj de geologio, ekz-e: inĝeniera geologio, hidrogeologio, krudaja geologio ktp., ankaŭ pri problemoj de geologiaj terboradoj kaj pri vivo de geologoj kaj terboristoj en la tuta mondo. Estas petataj ĉiuj esperantistoj-geologoj interligiĝi kun ĝi kaj doni al ĝi helpon. Adr.: Pola Esperanta Geologo-Klubo, Varsovio 10, str. Jasna 6, Pollando.

Memoriga poŝtmarko de Zamenhof en Brazilo

Laŭ peto de Brazila Esperanto-Ligo la Departemento de Poŝtoj kaj Telegrafoj de Brazilo eldonis poŝtmarkon memorige al la centjaro de D-ro Zamenhof. Ĝi aperis la 10-an de marto de la kuranta jaro. La poŝtmarko prezentas portreton de la aŭtoro de la Internacia Lingvo. Ĝia koloro estas verda kaj ĝia valoro Cr\$6.50. La eldona nombro estas 6,000,000. En Brazilo ĝi estas la sepa poŝtmarko dediĉita al Esperanto.

Korespondi Deziras



* **Docento Viktor Gruško** dez. kor. kun ĉinaj Esp-istoj, pri diversaj temoj. Resp. garantiata. Adr.: USSR Rostov-Don 6, Socialistiĉeskaja 169, kv. 4.

* **10 junulinoj-vendistinoj** de universala magazeno de aŭtomobila regiono en urbo Gorjkij (USSR) diversaj dez. kor. kun gejunuloj el ĉl. pri diversaj temoj skribu amase laŭ la adreso USSR Gorjkij-4, prospekt Stalina—3 3 kv. 34 al F-ino Vasiljeva A.

* **40-jara mininĝeniero** dez. kor. kun ministoj el ĉl. pri ĉt. Respondo garantiata. USSR. Uzlovaja

Tulskoj obl., ul. T. Daĉnaja 42-9, L. Fiŝbejn.

* **S-ro C. Riisgard** dez. kor. kaj interŝ. semojn, plantojn kaj bulbojn de Azio kun samaj el Danlando. Evt. rekompencos per pm. de Islando, komplete 1944-59. Serĉas speciale liliojn kaj orkideojn. Adr.: Abildgade 22, Arhus, Danlando.

* **Petro Frolov**, eksinstruisto de la ruslingvo, USSR, KBASSR, Tirnauz, ul. Ĉeĥova, 7, dez. kor. kun ĉl. pri E. k stenografia movado, cirk-arto k aliaj temoj, interŝ. laŭ reciproka konsento. Resp. ĉiam garantiata.

* **S. V. Rujencev**, konstru-inĝeniero, Novgorod obl., Leningradskaja 10 kv. 6, USSR. Dez. kor. kun Italio, Francio, Anglio, Amerikaj, Aziaj kaj Afrikaj landoj pri dt.

* **Andrej Sidorov**. ul. B. Ĥmelnickogo 10, Ĉerkassy obl., USSR. interŝ. pri faktoj de efika kuracado per aŭtosugestio kaj kurac-herboj de popola medicino.

* **St. Povilaitis**. Instruisto, dez. kor. kun ĉl. USSR. Litova SSR. Vilkaŭiskis, Kestuĉio 8-5.

* **Vitja Kirjak**, studento medicina, dez. kor. pri ĉt. kaj interŝ. E-librojn kaj E-gazetojn kun ĉl. USSR. Moldavia SSR. Kiŝinev, str. Ĉerniŝevskij 10, Komunloĝejo de la medicina Instituto.

(Pliajn anoncetojn vidu sur p. 123)

Post sia fondiĝo la Ĉina Popola Respubliko multe klopodis kaj klopodas por transformi la kulturen postrestecon de la popolo. Politikoj por malfermi la kulturajn pordojn al la laboristaj kaj kamparanaj amasoj estas alprenitaj. Malfacilaj skriboj reformataj, kampanjo antianalfabeteca ĉiamaniere antaŭenpuŝata, liberhoraj lernejoj disvastigataj. La klopodado en lastaj 10 jaroj akiris riĉan rikolton. Dank' al la rapida malgrandiĝo de la nombro de analfabetoj precipe en lastaj du jaroj, la laborulaj amasoj jam postulas altiĝon de siaj kulturaj niveloj. Tial fondiĝis en fabrikoj kaj popolaj komunumoj multaj liberhoraj mezlernejoj, eĉ mezaj teknikaj lernejoj aŭ universitatoj. En Pekino kaj Ŝanhajo, kie la kondiĉoj permesas, oni fondis universitatojn kiuj instruas pere de televido. Rezulte el tio la laborista-kamparanaj kadroj pogrande kreskas. Por ke niaj legantoj tion komprenu, en tiu ĉi numero ni aperigas plurajn artikolojn

tiuflankajn. El ili la novelo "Printempo jam venas" estas verko de k-do Fej Liven, unu el la laboristo-verkistoj. Ĝi ne nur ilustras la kulturen altiĝon de la laboristoj, sed ankaŭ priskribas ilian ĝojan kaj viglan vivon kaj novajn rilatojn inter la homoj.

Pri la nova antaŭensalto de nia ekonomia konstruado celata en 1960 kaj pri la nuna feliĉa vivo


Finredaktinte

de la liberigita popolamaso en Tibeto ni raportas respektive en la artikoloj "Pri la nacia ekonomia plano en 1960" kaj "Tibeta popolo impetas al demokratio kaj socialismo". Eble ili iel kontentigus la postulon de niaj karaj legantoj.

La pacdeziro de la ĉina popolo kaj ilia amikeco kun siaj najbaraj popoloj estas profunda kaj nerompebla, spite ĉiajn kalumniojn, intrigojn kaj incitojn fare de la

reakciuloj. Tion oni povas vidi en la artikolo "Amikeco eterna". Tion pravas, krom la subskribo de traktatoj inter Ĉinio kaj Birmo kiun ni raportis lastnumere, ankaŭ la subskribo de la "Kontrakto pri Landlima Problemo" kaj "Kontrakto pri Ekonomia Helpo" inter Ĉinio kaj Nepalo. Ne nur sukcese solviĝis landlima problemoj inter la du amikaj najbaraj landoj sed Ĉinio ankaŭ donos al Nepalo senkompensan helpon je 100,000 hindaj rupioj kun neniam politikaj kondiĉoj. Tion pravas ankaŭ la vizitoj de nia ĉefministro Ĝou Enlaj al Birmo, Hindio kaj Nepalo. Ĉio ĉi tio montras ankoraŭfoje ke la ĉina popolo, kiu koncentrigas siajn klopodojn kaj penadojn sur socialisman konstruadon, volas efektiviĝi interhelpon kaj kunlaboron kun siaj najbaroj laŭ la principoj de reciproka neinterveno en internajn aferojn kaj de egaleco kaj reciproka utilo, por pli rapide forigi niajn ekonomian kaj kulturen postrestecon kaj atingi komunan prosperon.

Guangfu-a Popolkomunumo de Vugubernio, Giangsu-provinco fondis 21 postlaborajn klerigajn kaj teknikajn lernejojn kaj 232 kursojn por likvido de analfabeteco, al kiuj partoprenis ĉiuj ĝiaj junaj kaj plenaĝaj membroj. Jen kursanoj lernas han-lingvon surkampe dum ripozo.



Postlabora lernado estas organizita ankaŭ ĉe la konstruejoj. Jen laborantoj sur la konstruejo de kanalo por konduki Taŭ-riveron sur monton lernas legi dum postlabora horo.



Fan Haj-liang, dungita kamplaboristo de Dengfeng-gubernio, Henan-provinco, antaŭ la Liberigo, nun jam fariĝis aŭtoro de pli ol 3,000 poemoj kaj rakontoj dank' al sia postlabora lernado. Li estas poluranta sian novan rakonton "Sarkado en Meznokto".

Gelernantoj de la postlabora mezlernejo de Hede-a Popolkomunumo, Ŝejang-gubernio, Giangsu-provinco, en lernado.





梅香
丁巳年
吳昌碩

TEXAS UNIVERSITY
1901